1987 majo
80a jaro
n-ro 977 (5)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando





"Ne plu nur hobio!"

La dua scienca revolucio portas ŝancojn kaj defiojn.

Vi trovos,

ke oni ne nur prilumas ĉi-numere la "ŝancojn kaj defiojn", kiujn starigas la nuntempa ondo de teknologia ŝanĝo; oni entreprenas kuraĝajn paŝojn alfronti ilin. Jen agadkampo eĉ pli esenca kaj grava por la evoluantaj landoj, ol por la industria mondo. Kaj ni konsciu, ke la evoluantaj landoj ne simple sidas kaj atendas nin! Paĝo 98 meritas, pli ol "Loke", la nomon "Afrike" — ĉar jen novaĵoj pri novaj, firme bazitaj landaj asocioj en Benino kaj Togolando (kaj plia en Sudafriko). Al ili, gratulon kaj kuraĝon! Kaj por ni ceteraj: ĉu ni kontentiĝu per la idealisma allogo kaj kulturaj valoroj de Esperanto, aŭ ĉu ni klopodu igi ĝin ankaŭ pli utila por la triamondanoj? Jen alia flanko de la ĉi-numera temo...

Enhavo

81 Esperanto en scienco: Sciencistoj kaj la movado bezonas unu la alian! (Boĵ. Popović)
83 Unesko-komisiono unuafoje aŭspiciis IFER (Stefan MacGill)
84 Distribuita lingvotradukado: Esperanto plifortigis sian rolon kiel kerno de DLT (Klaus Schubert kaj Toon Witkam)
86 Teknologio: Komputiloj en Esperanto-instruado (Derek Roff)
Komputilaj problemoj? KompRo helpos! (Jürgen Wulff)
88 Terminologio: Kion ni faru? Survoje al realigo de Terminologia Esperanto-Centro (Wera Blanke)
91 Aligu solidare ĉinojn al la Jubilea UK! (Nora Reinders)
Reagoj: Planlingvo estu planata (Audrey Childs-Mee); Endas racia diskutado (Rüdiger Eichholz); Ni praktiku praktikismon! (Ralph Dumain); Afriko bezonas pli ol entuziasmon (W. De Smet); Du vojoj por la verda venko (Bernard Golden)
94 Recenzoj: *Sisteme ordigita vortaro* de Michele Mariano (L.H. Knoedt); *Kaj poste* de Daphne Lister (Jan Exmann); *Bronza tigro* de Gŭo Moĵŭo/trad. Seimin (Rikardo Cash)
96 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
97 Oficiala Informilo
98 Loke—Fake (mallongaj novaĵoj)
100 Anoncetoj

La kovrilo

Per pikeme aldonita krisigno, ni garnis citaĵon el la artikolo sur p. 84-86 pri la evoluo de DLT. Konstato kaj pledo — kiun sencon vi kaptis? Se Esperanto efektive estas hobio por multaj el ni, ni povas samnomi ĝin kun Kalocsay, "la nobla hobio"; kaj neniu rajtus nomi tiun rolon, plenan je spirita valoro, hontinda aŭ primokinda. Sed ankaŭ decas, ke aliaj el ni portu kompleton kaj kravaton! Niaj artikoloj emas emfazi alian flankon de Esperanto, la originan, la cel-orientitan. Kaj nia kovrilo celas respeguli tion: ke la Esperantomovado reprezentas kopernikan revolucion en la internacia komunikado, kies centron la mondo ankoraŭ kredas teknika anstataŭ homa. Do, ni akceptu kaj celadu profesiiĝon — por ke alvenu niaj propraj Galileo, Kepler kaj Newton...

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.
Telekso: 23721 UEA NL; **Telegramadreso:** ESPERANTO ROTTERDAM.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 105 landoj.** Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Mark Fettes.
Abonprezo varias laŭlande (gld. 44,50; US $ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p.150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744.
Vicprezidanto (gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35.
Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tôkyô, 153, Japanio; tel. (3) 770 64 86.
Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.
Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Francio; tel. (1) 46 65 22 16.
Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.: tel. (1) 316-423.
Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.
Estrarano (gvidas la fakon pri financo): d-ro Victor Sadler, Livingstonelaan 304, NL-3526 HW Utrecht, Nederlando; tel. (30) 88 68 37.
Estrarano (gvidas internan agadon): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

Maandelijks tijdchrift "Esperanto", nr 977 (5), mei 1987. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

"Kial forrestis la Esperanto-movado de la scienca-teknika revolucio okazanta en la mondo?"

Jen demando starigita de la hungara ministro pri eksterlandaj aferoj, d-ro Várkonyi, en intervjuo aperinta en Hungara Vivo. *Demando, kiu sendube eĥas la reagon de multaj sciencistoj kaj aliaj homoj, kiam oni mencias Esperanton. Nu, temas ja parte pri mispercepto: kronologio preparita lastatempe de d-ro Haszpra (estrarano de UEA) montras rimarkindan kreskon en faka apliko de Esperanto dum la lastaj dek jaroj — kaj en tiu ĉi numero mem vi trovos esperigajn informojn pri progreso de la traduk-projekto DLT (kiu ekligiĝas pli forte kun la monda komunumo de Esperanto-parolantoj, kaj tiel ne nur promesas pli sed ankaŭ postulas pli de ni), kaj sur la aparte grava kampo de terminologia laboro. Indas doni pli da atento al diskonigo per naciaj lingvoj de tiaj evoluoj.*

Tamen, vi ankaŭ trovos sobrigajn konstatojn. Spite la fakton, ke vasta uzado de Esperanto portus grandajn avantaĝojn al la tutmonda scienca komunumo (vd. la novan Esperanto-Dokumenton 24E), Esperanto ne akceptiĝos tie de si mem; kaj la esperantistaro formas rilate sciencon kaj teknologion kvazaŭ triamondan landon, sen grandaj ekonomiaj aŭ homaj fortoj. Evidentiĝis ĉe la unua kunsido de la nova UEA-Komisiono pri scienca kaj teknika aplikado, ke la komisiono posedas talentajn kunlaborantojn kaj ampleksan laborplanon, sed havas malfirmajn ideojn pri kiel atingi konkretajn rezultojn, kaj pluropiniecon pri siaj prioritatoj. Kiel ĝi, kaj ni, povos difini ilin? Nur per vasta kaj realisma diskuto kaj mondskala kunlaboro — por kiuj celoj niaj paĝoj estas ĉiam malfermitaj! mf

Sciencistoj kaj la movado bezonas unu la alian!

La ideo uzi Esperanton por komuna scienca lingvo en si mem estas tiom racia, ke preskaŭ ĉiuj opiniis ke sufiĉos simplaj alvokoj de elstaraj sciencistoj, kaj/aŭ de altaj sciencaj institucioj, por ke sciencistoj ekagu tuj pozitive: lernu Esperanton kaj praktike ekuzu ĝin por sciencaj kontaktoj kaj scienca publikigado.

Sed la realo montriĝis senesperiga. La unuaj tiaj paŝoj — unuopaj membroj de famaj sciencaj akademioj, inter kiuj unuavice la franca, kaj la impona alvoko de la Franca Akademio subskribita de 40 akademianoj — donis tre malabundajn fruktojn. Se nun ripetotaj, tiaj alvokoj eble pli sukcesus, ĉar nun ekzistas tra la mondo granda nombro da esperantistoj-sciencistoj, tre multaj fakaj terminaroj, artikoloj en Esperanto dissemitaj tra diversaj fakaj revuoj, esperantistaj kaj neesperantistaj, per kiuj la scienca esprimkapablo de Esperanto estas pruvita por ĉiu bonintenca sciencisto. Sed estas neutile eĉ starigi nun tiun demandon. Unuflanke pro la situacio en sciencaj rondoj mem (i.a. tre ampleksaj agadkampoj kaj la fortaj radikoj de la angla); aliflanke, ĉar neniun altrangan scienciston povus entuziasmigi por tiu celo la nuna Esperanto-movado — vasta sed fakte tre malforta kaj malunueca, cetere tiom plurece burokratigita, ke eĉ okaze de la 100-jariĝo de Esperanto ĝi ne trovis eblecojn por kunlabori!

Pro tio mi limigos la artikolon je scienca publikigado en Esperanto — kaj mi aldonu preterpase, ke por la ĉi-supraj alvokceloj oni neniam uzu Esperanton, ĉar esperantistojn oni ne bezonas konvinkadi pri ilia lingvo!

La ĉefa tasko de fervora sciencisto-esperantisto estas verkadi kaj publikigadi pri siaj studoj en Esperanto — kaj multe pli, ol ĝis nun. Mi ja proprasperte scias, ke ĉiu, kiu publikigas sciencan esploraĵon en Esperanto, iom riskas ke ĝi restos malpli konata ol se ĝi estus presita en unu el la "mondlingvoj". Sed la risko estus same granda, se la artikolo aperus en nemulte konata nacia lingvo. Kaj verki en Esperanto estas ankaŭ parto de porscienca laboro: por scienco de la estonteco, kiam ĝi evoluos pli rapide dank' al la komuna lingvo.

Alia ofta malagrablaĵo por sciencisto verkanta en Esperanto, estas la emo de redaktaj komitatoj (aŭ eĉ la redaktoroj solaj) alproprigi la povon prijuĝi (burokrate kaj primoke) ne nur la enhavon, sed ankaŭ la lingvon. La sukceso, nun ankoraŭ, dependas multe pli de la persona influo kaj insistemo de la aŭtoro ol de aliaj kriterioj. Tiuflanke estas tre grava la organizita kolektado de sciencaj publikigaĵoj en Esperanto kaj trafa informado pri ili, kiel oni nun faras preskaŭ sole pri interlingvistiko. Enirante la duan jarcenton, ni neniel rajtas lasi al sciencistoj, ke ili solaj zorgu pri penetrado de Esperanto en sciencon. La ĝenerala movado devas zorgeme helpadi ilin plenumi tiun taskon, ĉar ju pli altiĝos la socia prestiĝo de Esperanto, des pli facile la novaj adeptoj alvenados por publikigadi sciencaĵojn kaj des malpli oni bremsos kaj primokos ilin pro tio.

Kunlige kun la antaŭa, stariĝas tuj la demando: ĉu kaj kiuspecaj sciencaj revuoj aperadu en Esperanto mem?

Se oni konsiderus nur la deziron publikigadi kiel eble plej multe en neesperantistaj sciencaj revuoj, tiu deziro estus forta argumento kontraŭ sciencaj revuoj en Esperanto. Sed unu afero estas la deziro kaj alia la realo. En la nunaj cirkonstancoj, Esperanto estas ankoraŭ malfavorata kompare kun la aliaj lingvoj, ĉu en naciaj, ĉu en plurlingvaj revuoj. Dum la malrapida, pena enpenetro de Esperanto, sciencistoj verkantaj en la lingvo ne havus ofte la eblecon publikigi siajn verkojn, se ne ekzistus sciencaj revuoj pure en Esperanto.

Kelkfoje, do, la vivo jam starigis la demandon: ĉu pli taŭgas ĝenerala (plurtema) revuo, aŭ kelkaj por diversaj sciencoj? La plej firme bazitan respondon (pere de organizita larĝa diskuto) donis jarkunveno de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) en 1969: forta, vivkapabla plurfaka scienca revuo, kies numeroj havu nur unufakan enhavon.

Tian solvon sekvis de tiam *Scienca Revuo* de ISAE, sed ĝia daŭra apero eblas nur dank' al la ekzisto de ISAE kaj la revua subtena organizaĵo. Mankas ankoraŭ solidareca subteno de la ĝenerala Esperanto-movado al ISAE kaj al ĝia revuo. Kiam oni de tempo al tempo vidas kiom da financaj rimedoj elspezadas ĉiujare UEA kaj multaj landaj asocioj (eĉ ne konsiderante aliajn internaciajn organizaĵojn), por celoj ofte senfruktaj, estas mirinde bagatelaj la sumoj bezonataj por subvencii unu imponan sciencan revuon — por ke ĝi post 20-30 jaroj fariĝu sufiĉe ampleksa kaj enhave interesa por multegaj bibliotekoj, kaj tiel malfermu multajn pordojn por lavange larĝa penetro de Esperanto en sciencon.

Mi ne rajtas pritrakti ĉi tiun parton de la problemo sen turno al du plej gravaj malglataĵoj rilate la starpunkton de ISAE kaj ĝia revuo: *Geologio Internacia* kaj *Sciencaj Komunikaĵoj*. La unua montras, ke ankaŭ unufaka revuo en Esperanto estas ebla, se taŭgaj vivkondiĉoj (ĉi-foje eldona kaj distribua ligiteco kun la internaciaj kongresoj) ekzistas. Tio tamen estas escepta kazo kiu ne ĝenas la ĝeneralan regulon. La taskoj de *Scienca Revuo* feliĉe malgrandiĝus, se ankaŭ pluraj aliaj fakoj havus siajn esceptajn kondiĉojn por eldoni la propan revuon!

Tute aliel statas la afero pri *Sciencaj Komunikaĵoj*. Unuflanke ĝi utilas al la movado ĝenerale; sed aliflanke, ĝi kovras paralele la agadkampon de ISAE kaj SR kaj tiel disigas la sciencistajn fortojn kaj financajn rimedojn. Estus pli bone serĉi vojojn por kunlaboro ol elstarigadi apartan grupon de valoraj homoj kaj apartan fonton de financado.

Por esti persvada en sciencaj rondoj, scienca revuo en Esperanto devas esti ampleksa, enhavriĉa, akurata kaj ne tro multekosta. Denove en tio povas grave roli la ĝenerala movado, per abonado devenanta de nesciencistoj komprenantaj la gravecon de tia revuo (kiam ili havas supraĵan, aŭ eĉ tre modestan interesiĝon pri ĝia enhavo) kaj per helpo de esperantistaj organizaĵoj malpli avara ol ĝis nun.

Akurateco kaj konstante granda nombro da abonantoj implicas, ke la revuo devas esti administrata kun alta grado de organiziteco. Organizi tian laboron profesie estas multe pli facile ol organizi ĝin per libervola kunlaborado. Pro tio oni rajtas neniam subtaksi la pure organizan laboron en scienca asocio, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo por havi bonan sciencan revuon, kiu siaflanke necesas kiel interligilo. Do, forta sciencista asocio kaj bona revuo ĝia estas intime kunligitaj. La plej bona negativa ekzemplo de tio estas la iama pereo de *Kemio Internacia,* kiu havis favoraj ĉiujn vivkondiĉojn, krom organizaĵon kiu subtenus ĝin konstante.

Pro specialaj cirkonstancoj, fakaj sciencistaj organizaĵoj devas funkcii memstare, sendepende de la ĝenerala movado, sed kun ofta intima kunlaboro — plej bone kiel sekcioj de komuna plurfaka sciencista asocio, nun ISAE, kiu tiel estus "la komuna tegmento por ĉiuj sciencaj fakaj societoj". Sed tio neniel signifas, ke la ĝenerala movado rajtas nezorgi pri ilia vivo: tia zorgo devas senĉese ekzisti, en la formo de helpado, ne en la formo de komandado!

Boĵ. Popović

LA TUTMONDA ESPERANTISTARO SALUTAS BJALISTOKON

Jen la titolo de ekspozicio en la naskiĝurbo de Zamenhof, kiun organizas la bjalistokaj esperantistoj. Ekde malfermo planata por la 29a de julio — la ekskurso-tago de la UK — oni prezentos Esperantajn librojn, revuojn, informilojn, filatelaĵojn, insignojn, prospektojn k.s., kiujn donacis diverslandaj esperantistoj al la konstruota Internacia Esperanto-Centro. Krome estas bonvenaj salutkartoj, instrumaterialoj kaj infan- aŭ aliaj artaĵoj.

Sendu vian kontribuaĵon laŭeble rapide al:
Esperanto-Centro, 15-540 Bjalistoko, Pollando.

Ĉar la nuna ofichavanto foriros ĝis la fino de tiu ĉi jaro, UEA serĉas kandidatojn por la posteno de

Direktor(in)o de la Centra Oficejo

Ni atendas de la dungoto sperton pri oficeja kaj financa administrado, plenan regon de Esperanto kaj vastan konon de la Esperanto-movado, same kiel maturan, diplomatian kaj reprezentan personecon. Kandidatigaj leteroj kun plenaj biografiaj informoj estu adresitaj al Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Se necese, bv. telefoni (010) 436 10 44 (Milojević aŭ Buller).

Unesko-komisiono unuafoje aŭspiciis IFER

Kiel praktika sekvo de la nova rezolucio de Unesko pri Esperanto, unuafoje la Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo (IFER) en Leipzig ricevis la oficialan aŭspicion de la Unesko-komisiono de GDR. La ĉefa surprizo de la solena malfermo estis la prelego de d-ro Helmut Tautz (mikrofone en la foto), membro de la prezidio de la Unesko-komisiono de GDR kaj estro de ĝia kultura sekcio, kiun li faris en bona kaj klara Esperanto. Li konfesis ne nur antaŭlongan lernon de la lingvo, sed ankaŭ, ke kiel delegito de GDR en la 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Sofio li helpis formuli la rezolucion 11.11 favore al Esperanto.

D-ro Tautz transdonis al IFER saluton de la Prezidanto de la Unesko-komisiono en GDR, d-ro Peter Florin, kaj de la Ministro por Kulturo en GDR, d-ro Hans-Joachim Hoffmann. Li aldonis: "La Unesko-komisiono de GDR volonte transprenis la patronecon de la Foira Renkontiĝo dum la Jubilea Jaro de Esperanto. Por ni tio ne restos la sola ago. Ni jam inserkonsentis ke GDREA... en septembro raportos antaŭ la faksekcio kultura ĉe nia Unesko-komisiono pri la UK en Varsovio kaj pri la hodiaŭ malfermita aranĝo. Ni ankaŭ transdonos informon pri IFER '87 al la Ĝenerala Direktoro de Unesko, s-ro M' Bow."

Sur la foto ni aldone vidas (de maldekstre) s-inon Sabine Schulze, prez. de la distrikta estraro de GDREA kaj ano de organiza teamo, Prof. Otto Haszpra (Hungario), estrarano de UEA, prof. Peter Heldt, prez. de la distrikta estraro de Kulturligo de GDR kaj d-ro Detlev Blanke, sekretario de GDREA. Krome ĉeestis antaŭa urbestro de Leipzig kaj konsulo de la pola ambasado.

IFER logis 270 partoprenantojn el 15 landojn — laŭdinda cIFERo. La organizado estis glata kaj preciza, la urboranda rekontiĝejo moderna kaj taŭga, la enkondukado de la prelegantoj kaj programeroj ne nur modele bona, sed eĉ akompanata per speciale verkita IFER-fanfaro. La kvalito de la prelegoj estis tia, ke kun vera bedaŭro oni devis elekti inter Flóra Szabó-Felső (La universaleco de UEA hodiaŭ kaj morgaŭ) kaj Otto Haszpra (Esperanto en la scienc-teknika revolucio); poste inter Péter Broczkó pri "Esperanto en modernaj ŝlosilteknologioj" kaj Werner Bormann pri "La Akademio kaj la esperantistoj". Klaus Schubert donis freŝajn informojn pri la nederlanda traduk-projekto DLT, dum samtempe Herbert Mayer katalogis la laboron de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Krome prelegis la ĉeha verkisto Jiří Karen, la soveta astronomo d-ro Andronov, la bulgara pacmovadano Violin Oljanov kaj la pola radioredaktoro Andrzej Pettyn.

La distra programo konsistis el skeĉoj de Stefan MacGill, dancgrupoj hindaj kaj anglaj (morisaj), diskoteko kaj satiro prezentita de Rudolf Burmeister.

El antaŭa du-hora gazetara konferenco rezultis kelkaj artikoloj, krome radio-dissendo kaj surloka televida intervjuo kun s-ro Clement Tholet, prez. de Mondpaca Esperantista Movado, gasto de IFER el Belgio. Tion suplementis 8-minuta intervjuo kun d-ro Detlev Blanke, registrita anticipe en Berlino kaj dissendita okaze de la renkontiĝo. Ankaŭ staris Esperanto-ekspozicio en la publika inform-centro de Leipzig-Grunau.

Fakte, la IFER kreskis kaj alprenis la trajtojn de nacia kongreso. Pro ĝia seriozeco, bona organiziteco kaj grando, IFER abunde meritas la atenton kaj aŭspicion de Unesko.

Stefan MacGill

Esperanto plifortigis sian rolon kiel kerno de DLT

"Distribuita Lingvotradukado" (DLT) estas la nomo de longdaŭra esplora kaj evoluiga projekto de la nederlanda programarentrepreno BSO en Utrecht. La rezulto de la projektlaboro estu **komputila sistemo por tradukado** inter homaj lingvoj. En esperantista medio DLT ricevis dekomence grandan atenton, ĉar unu el la esencaj inventideoj de DLT estis uzi Esperanton kiel interlingvon. (Pli fruaj informoj pri la projekto troviĝas en *Esperanto* 1982/p.98 kaj 201, 1984/p.5-7 kaj 218-219, kaj 1985/p.101-102.)

La esenco de DLT

Post multaj vanaj provoj jam ekde la 40-aj jaroj, la fakuloj atingis la nuntempe tre vaste akceptitan konkludon, ke tutaŭtomata tradukado estas malebla, se la rezulto havu akcepteblan kvaliton. La nun jam ekzistantaj perkomputilaj traduksistemoj kutime sekvas la ideon, ke oni do traduku tutaŭtomate kaj poste donu la rezulton por korektado al homo. Tiu **postkorektanto** devas esti tradukisto kaj regi la originan kaj la celan lingvojn. DLT, kontraŭe, estas destinita por funkciado en interkomputilaj retoj, kie ne eblas postkorekti en iu efika maniero. Pro tio, DLT estas aranĝita tiel, ke la homo ekagas ne post la komputilo, sed samtempe kun ĝi. Ĉe DLT la homo ne korektas la erarojn, faritajn de la sistemo, sed helpas al la sistemo "kompreni" la tradukatan tekston, tiel ke ĝi traduku ĝin ĝuste. La helpado okazas per **interaga dialogo,** iniciatita de la sistemo. Grava eco de tiu dialogo estas, ke ĝi okazas en la lingvo de la teksto. Do la helpanta homo ne bezonas esti tradukisto, kaj devas regi nek Esperanton, nek la cellingvon.

Laŭ disponeblaj informoj DLT estas unu el la dek plej grandaj esploraj kaj evoluigaj projektoj en la mondo, kiuj koncentriĝas ĉefe en okcidenta Eŭropo kaj Japanujo. DLT, samkiel ĝiaj konkurantoj, celas la tradukmerkaton de la jaroj 1990 ĝis eble 2020. Kontraste al la konkurantoj, DLT direktas sin principe al ĉiaj lingvoj. Ĝi estas konceptita tiel, ke estu relative facile aldoni plian originan aŭ celan lingvon, sen ke necesus por tio ŝanĝi ion en la jam ekzistanta sistemo. Per tio ĝi ofertas ŝancojn precipe ankaŭ por nehindeŭropaj lingvoj kaj ankaŭ la lingvoj de malgrandaj lingvokomunumoj.

La evoluo de DLT

DLT estis de 1979 unuhoma parttempa projekteto de sia inventinto, inĝ. Toon Witkam. En 1982 ĝi fariĝis plentempa, profesia okupo, kaj aldoniĝis dua kunlaboranto. La Eŭropa Komunumo en 1982-83 subvenciis studon pri realigeblo, kies finraporton (A.P.M. Witkam (1983): **Distributed Language Translation.** Utrecht: BSO [elĉerpita]) oni vendis kaj diskutis ankaŭ en Esperantujo. Tiu raporto enhavis, apud multo alia, priskribon de la modifoj, kiujn necesas fari en Esperanto por taŭgigi ĝin por ĝia funkcio en DLT. Por signi klare, ke la interlingvo de DLT ne ekzakte kongruas kun Esperanto, sed estas modifita variaĵo de ĝi, la nova variaĵo ricevis la nomon IL ("interlingvo").

Post studo de tiu antaŭesploro la firmao BSO decidis eniri la fazon de **esploro kaj evoluigo.** De la komenco de 1985 aktivas en Utrecht ĉirkaŭ 15-persona laborgrupo de komputistoj kaj lingvistoj sub gvido de Toon Witkam, kiu en sesjara periodo intencas pretigi prototipon de la sistemo DLT por unu lingvoparo (angla-franca) kun la kompleta IL-kerno de la sistemo. DLT havas por tiu periodo buĝeton de 17 milionoj da guldenoj, proksimume poduone de BSO mem kaj el subvencio de la nederlanda Ministerio pri Ekonomio. DLT do estas **produkt-orientita** projekto. Tamen survoje al la celata produkto, t.e. tradukanta komputilsistemo, necesas realigi multe da teoria kaj esplora laboro sur pluraj terenoj el lingvistiko kaj informadiko.

Atingoj

En 1985 kaj 1986 oni evoluigis, surbaze de la preparstudo, malgrandajn unuapaŝe eksperimentajn, poste pli elprovitajn versiojn de:

— sintaksa filtrilo por la IL, kiu rekonas sintakse korektajn kaj rifuzas nekorektajn frazojn,
— sintaksa analizilo por la IL, kiu el korektaj frazoj konstruas sintaksajn arbostrukturojn kun indiko de la gramatikaj rilatoj inter la vortaro,
— IL-vortaro kun sintaksaj trajtoj.

Ĉi ĉiuj servas al la traktado de la **gramatika formo** de frazoj. Tre grava problemo en tradukado tamen krome estas la transmeto de preciza **signifo** de vortoj, frazoj kaj tekstoj. Por tiuj **semantikaj** problemoj estas konstruitaj:

— **vortsciobanko,** kies funkcio similas al tiu de semantika difina vortaro. La IL-sciobanko de DLT ampleksas nuntempe ĉ. 50 000 rilatoparojn, kiuj indikas la laŭsignife eblajn tujajn ĉirkaŭaĵojn de la unuopaj vortoj.
— vorteksperta sistemo por elekti inter la alternativaj tradukoj de unuopaj vortoj, konstruita kaj funkcianta laŭ la teknikoj de **artefarita inteligento,**

— formaligitaj dulingvaj vortaroj por la IL kaj la angla respektive la franca.

En decembro 1986/januaro 1987 okazis grandskala testo pri la tradukprecizeco atingebla per la vorteksperta sistemo. Tiun teston gvidis kaj kontrolis ekstera neŭtrala juĝanto, prof. Alan Melby de la usona Brigham-Young-universitato en Provo. Lia juĝo estis kuraĝiga kaj stimula.

Komenciĝis detala ellaborado de unu el la limigitaj gramatikoj de la angla, uzataj en la eŭropa aviadilindustrio por teĥnikaj tekstoj, nomata "Simpligita Angla". Tiu faciligita lingvaĵo servos kiel unua origina lingvo en DLT, kiel duonvoja celo survoje al la kompleta (tamen nur skriba, nebeletra) angla, el kiu oni esperas traduki fine de 1990.

Dumvoja bilanco

Malgraŭ la malfacileco plani esploran agadon, kies prezicaj daŭro kaj rezulto ofte ne estas senpere takseblaj, la projekto tre ekzakte sekvas sian tempo-

planon. Ĝi ankaŭ restis ĝis nun en la kadro de sia buĝeto. Kaj, kio estas plej grava, la atingitaj rezultoj ne postrestis la atendojn.

El tiuj rezultoj, unu estas aparte interesa por esperantistoj. De 1985 ĝis nun evidentiĝis pli kaj pli la esenca rolo de Artefarita Inteligento en la perkomputila traduklaboro. Artefarita inteligento klopodas pri simulado de kelkaj tre gravaj funkcioj de la homa pensado. Ĝia apliko en tradukado ne eblas sen la dispono pri ampleksa sciobanko en aŭtomate prilaborebla formo.

Grava evoluo de la pasintaj du-tri jaroj estas, ke en DLT la bezonataj semantikaj pesadoj, komparadoj kaj decidadoj montriĝis tiel pezaj, tiel ambiciaj (kaj ankaŭ tiel defiaj), ke estus grava malŝparo se oni devus ripeti ilin por ĉiu aparta lingvo per ĉiam nova sciobanko, konkludregularo, komparinstrukciaro ktp.

Esperanto, kies funkcio en DLT laŭ la originaj planoj nur devis esti tiu de tre regula kaj kompakta duonvoja tekstperilo, en la nuna DLT-arkitekturo ludas multe pli gravan rolon. Ĉiuj malfacilaj prilaboroj de la tradukata teksto okazos en la IL. La IL fariĝis la **lingvo de artefarita inteligento.** Oni analizas la anglalingvan tekston nur tiom, kiom tio eblas en la angla per formalaj rimedoj. Kiam aperas unu el la oftaj anglaj sintaksaj ambiguecoj, por kies solvo necesus kompreno de la enhavo de la frazo, oni ne tuj aplikas tiun komprenon, sed unue simple produktas ĉiujn formale eblajn analizojn por la angla frazo, tradukas ilin ĉiujn, kaj nur poste, kiam la frazo jam estas (pluroble) tradukita al la IL, elektas inter tiuj alternativaj tradukoj helpe de la sciobanko kaj la vorteksperta sistemo. Tiel pezaj estas tiuj semantikaj laboroj, ke pli valoras la penon multobligi la prilaborendajn frazojn en unu lingvo, ol trakti malpli da frazoj en pli da lingvoj.

Ĉi tiu nova centra rolo de la IL igis ankoraŭ pli grava ol antaŭvidite la **leksikografion,** kaj kadre de ĝi speciale la **terminografion.** Fariĝis pli grava ankaŭ la ekzakta difino de la modifoj, necesaj en Esperanto por igi ĝin IL. La DLT-laborgrupo en marto 1986 lanĉis enketon inter interlingvistoj, esperantologoj kaj aliaj interesiĝantoj pri tiuj modifoj. Dank' al la rezultoj de la enketo, kiun respondis kvindeko da spertaj lingvokonantoj, kaj kompreneble ankaŭ dank' al la propraj spertoj en la praktika laborado per la IL, la DLT-anoj komence de 1987 povis plidefinitivigi siajn decidojn. La ĉefa novaĵo pri tiuj decidoj estas, ke **la IL de DLT grave proksimiĝis al normala Esperanto.** Aro da modifoj, proponitaj en 1983, nun ne plu necesas. Tio ŝuldiĝas interalie al la enkondukita nekutima sintaksa modelo, la dependogramatiko de Tesnière, kiu montriĝis pli potenca ol siatempe estis premisite, sed ankaŭ al pli teorie principa konsciiĝo pri tio, ke ne eblas aldoni ion al sistemo (kaj la gramatiko de lingvo ja estas sistemo), sen ke tio ŝanĝas ankaŭ la funkciojn de ĉiuj jamaj sistemeroj. La IL de DLT do pli forte apogiĝas sur la ekzistanta Esperanta lingvokomunumo. Tio validas aparte por leksikografio, kie la vortaristo devas povi fidi sian per longa praktikado akiritan lingvosenton. Tiu lingvosento estas ĉiam Espe-
ranta, neniam IL-a.

Tiusence la IL, malpli diferenca de Esperanto ol atendeblis antaŭ kelkaj jaroj, ne nur restis, sed eĉ plifortiĝis kiel la spino de la tuta sistemo DLT.

Perspektivoj por DLT kaj por Esperanto

Kvankam la ĉefa celo de DLT estas ĝis 1990 pretigi prototipon por traduko el la angla al la franca, jam nun en tre modesta skalo okazas preparlaboroj por eventualaj moduloj por kromaj lingvoj. Tiuj laboroj okazas parte kunlabore kun universitatoj kaj esplorgrupoj en la koncernaj landoj. Ĝis nun tiaj preparstudoj traktis la germanan kaj la danan kiel lingvojn de EK, kaj la finnan kaj la hungaran kiel nehindeŭropajn lingvojn. Estas preparataj interkonsentoj ankaŭ por similaj laboroj rilate latinidajn, slavajn kaj orientaziajn lingvojn.

Pli grava eble ol la aldono de plia origina aŭ cela lingvo al la traduksistemo tamen estas la evoluigo de la speciala leksikografia tereno terminografio en Esperanto. La tradukado de faktekstoj, por kiu DLT estas destinita, postulas altgrandan precizecon. DLT tial kun intereso kaj kunlaboremo observas la nuntempajn aktivecojn ĉirkaŭ Terminologia Centro en Budapeŝto, samkiel ankaŭ ĉirkaŭ la kanada Pekoteko-projekto.

Estas notinde, ke la novaj komputilaj teknikoj kreis pli bonajn kondiĉojn ol ekzistis antaŭe por rapida, internacia kunlaborado sur la tereno de terminologio, leksikologio kaj Esperanta gramatiko. En pli longa perspektivo, DLT povus fariĝi "distribuita", t.e. malcentra, ankaŭ en tiu senco, ke diversaj laborgrupoj en diversaj lokoj kaj landoj kunlaborus en la konstruado de ampleksa, multlingva traduksistemo, en kies kerno. kiel nemalhavebla ŝlosilo, funkcius Esperanto.

Mondvasta kunlaboro pri DLT povas implici tre interesajn perspektivojn ankaŭ por la Esperanta lingvokomunumo kaj aparte por la terminologoj kaj gramatikistoj de Esperanto. Necesas tamen ĉi-rilate ankaŭ konscii pri tio, ke ĉi tia internacia kunlaborado kaj DLT mem tre forte dependas de **kunlaborantoj kun bona lingvistika edukiĝo,** kiuj samtempe **ĝisfunde regas Esperanton.**

DLT ŝatus, nelaste pro ĉi tiu kaŭzo, laŭ siaj kapabloj kaj eblecoj kontribui al du evoluoj, kiuj ŝajnas esti gravaj ne nur por DLT kiel industria esplorprojekto, sed ankaŭ por la pozicio de Esperanto mem en la fakaj medioj de la hodiaŭa mondo.

1. Necesas sproni la interesiĝon pri interlingvistiko kaj esperantologio ĉe la lingvistikaj institutoj de universitatoj. Esperanto devas ne plu esti nur hobio, sed ankaŭ la faka mondo konsciiĝu pri la scienco pri planlingvoj.
2. Necesas porti la interlingvistikan sciencon eksteren. Por tio gravas publikigi sciencajn librojn pri planlingvaj temoj en etnaj lingvoj kaj prefere en la plej legataj lingvoj de lingvistika publikado, do la angla, la franca, la germana... Same gravas aperigi interlingvistikajn artikolojn en internacie reputaciaj revuoj, prefere ol en memeldonitaj bultenoj, kiuj atingas nur jamkonvinkitojn.

Konklude eblas diri, ke la projekto DLT komenciĝis kiel ekstermovada esplorprojekto, por kiu oni en unu ĝia parto intencis uzi Esperanton. DLT daŭre estas kaj restas ekstermovada. Tamen ĝia evoluo montris, ke ĝi pli forte ol supozite dependas de la Esperanta lingvokomunumo kaj de la scienco pri Esperanto. El tiu evoluo rezultas por Esperanto kaj DLT allogaj kaj promesaj komunaj perspektivoj.

Klaus Schubert kaj **Toon Witkam**

Komputiloj en Esperanto-instruado

Ekde la apero de komputiloj, oni antaŭvidis uzon edukan. En la sesdekaj jaroj, kelkaj prognozis la malaperon de normalaj lernejoj, kredante ke ĉiu instruo okazos pli bone en la hejmo de la lernanto, per elektronika ligo al centra komputilo. La apero de "hejmaj komputiloj" antaŭ dek jaroj renovigis tiun ideon. Nia sperto ekde tiam sugestas, tamen, ke malgraŭ mirinda evoluo de la maŝinoj kaj programaroj, komputiloj uziĝas ĉefe por flankaj aferoj, por igi interesitaj la lernantojn, por doni kroman ekzercadon al postiĝantaj studantoj, kaj kiel studobjektoj mem. Montriĝis ke perkomputila instruo kiel normala parto de tradicia studobjekto, inkluzive matematikon kaj sciencon, estas tre malofta.

La kialoj por tiu surpriza situacio estas komplekssaj, sed inkluzivas: mankon de tempo kaj emo por lernado pri komputiloj ĉe instruistoj kaj administrantoj; mankon de normoj, kaj rapidan evoluon de la maŝinoj; kaj reciprokan mankon de kompreno inter la programistoj kaj la eventualaj uzantoj de la programaroj. Tial la plej oftaj programoj ne bone funkcias, ne bone instruas, aŭ estas tedaj.

KOMPUTILAJ PROBLEMOJ? KOMPRO HELPOS!

Ĉu vi bezonas kontaktojn kun komputilistoj kiuj parolas Esperanton? Ĉu vi havas interesajn ideojn rilate al la temo "Esperanto kaj komputiloj?" Ĉu vi serĉas specialajn programojn pri artefarita inteligenteco? Ĉu via komputilo ne kapablas presi la Esperantajn literojn?

Skribu al la Komputila Rondo **(KompRo). KompRo** estas organizo kiu celas helpi al homoj kiuj bezonas kontaktojn kun aliaj samideanoj kiuj profesie aŭ hobie laboras per komputiloj. Viaj problemoj estos publikigitaj en la *KompRo-informilo.* Tiu informilo aperas kelkfoje dum unu jaro. Ĉiu membro de **KompRo** senkoste ricevas ĝin.

La informilo ankaŭ enhavas artikolojn pri komputilaj problemoj kaj komputilaj temoj, kiujn verkas la membroj de **KompRo.**

Por membriĝi en **KompRo** sendu vian adreson kaj indikojn pri via(j) komputilo(j) kaj ilaro al: Jürgen Wulff, Papenstr. 5 b, D-2000 Hamburg 76, FRG.

Kiu unue volas ricevi provekzempleron de la *KompRo-informilo* skribu al la menciita adreso. Se eblas, bonvolu kunsendi internacian respondkuponon.

Jürgen Wulff

Lingvoj estis la temo de fruaj eksperimentoj en perkomputila instruado, kaj instruprogramoj por fremdaj lingvoj ankoraŭ aperas regule. Oni vidas en komputilo la eblecon ekzercigi lernantojn ekster la klasĉambro pri la plej ripetaj kaj mekanikaj aspektoj de la lingvo, dum la parola lingvo ekzerciĝas dum la klashoroj. Eble pro la ĝenerale malalta sukceso en la lernado de fremdaj lingvoj, instruistoj estas pli pretaj provi novajn metodojn, kaj subtenis la evoluigon de programaroj pli ol en aliaj fakoj. Multaj programoj ekzistas, de varia kvalito. Grandaj komputiloj funkciigas kompleksajn, flekseblajn, interesajn programojn, dum por personaj komputiloj, normale haveblas nur la plej bazaj ekzercigiloj.

Ni frontas tute similajn problemojn rilate la evoluigon de programaroj por instrui Esperanton. Kompare kun normalaj fakoj, nia merkato estas malgranda kaj internacia maŝina vario estas multe pli granda ol nacia. Tamen, kontraste kun aliaj instruprogramoj, programaro pri Esperanto povas esti internacie uzata, sen traduko aŭ ŝanĝo, kaj la regula gramatiko kaj fonetiko de Esperanto harmonias kun la postuloj de programado kaj perkomputila lernado. Ni ne povas atendi eldonadon de aro da bonaj programoj, sed nia unika komunumo povas stimuli kaj flegi la klopodojn de individuoj kaj malgrandaj grupoj, por krei programojn taŭgajn al specifaj edukaj celoj. Interŝanĝo de ideoj kaj solvoj, speciale se homoj komencus uzi la saman programlingvon, altigus la kvaliton kaj edukan valoron de instruaj programoj. Du kampoj estas speciale esplorindaj.

Lingvo estas esence parola afero, foje kun skriba kodo por la sona fenomeno. Pro tio, programaro kiu traktas nur la skriban formon komencas kun grava limigo. Efika programo kiu kapablas rekoni la parolon de diversaj homoj ankoraŭ ne ekzistas, sed modernaj mikrokomputiloj kapablas paroli. Kun fonetika lingvo kiel Esperanto, pere de la nunaj parolprogramoj, eblas prepari programon kiu eldiros la programitajn demandojn, la tajpitajn respondojn de la lernanto, kaj ĉion alian kio aperas sur la ekrano. Tio donos ligon inter la parola kaj skriba lingvo kiu valoros por ĉiu lernanto — aparte por tiuj, kiuj lernas sen la helpo de instruisto. Por blinduloj, tia parolprogramo permesus novan aliron al la lingvo, kaj se eldonistoj pretus kunlabori, ĉiu eldonaĵo elektronike kompostita estus uzebla por homoj kun vidproblemoj, sen la malrapida kaj kosta surbendigo.

Ekzistas diversaj frekvenctabeloj de parola kaj skriba Esperanto, inkluzive tiujn de *Kontakto,* de la Akademio, kaj de la Zagreba Metodo. La uzo de tiaj vortlistoj permesas pli efikan kaj konsekvencan preparon de instrumaterialoj. Instruistoj (aŭ redaktistoj), kiuj volas krei taŭgan demandaron, ekzamenon aŭ legaĵon per specifa vortostoko, nur malfacile povas memori kaj kontroli, kiu vorto apartenas al kiu nivelo. Tamen, eblas krei apartan maŝinvortaron por ĉiu ĉapitro, nivelo aŭ vortlisto laŭnecese. Uzante la ĝustan vortaron, la maŝino kontrolos la tekston kaj montros ĉiun nekonatan vorton. Kelkaj reverkoj por eviti tiujn vortojn estas relative facilaj.

Posedantoj de "Macintosh"-mikrokomputilo nun disponas pri ĉi tiu litertipo ("Roman"), kiu enhavas sub- kaj supersignojn por pli ol 75 skribitaj lingvoj, inkluzive Esperanton. Ĝi haveblas kontraŭ US$100 de:

Linguists' Software, 106 R Highland St, South Hamilton MA 01982, Usono.

Esperantistoj cetere notu, ke ĝuste tiuj mikrokomputiloj estas verŝajne la plej potencaj en la mondo por preparado de novaĵbultenoj kaj revuoj!

La regula aldona procezo de Esperanta vortformado faciligas la kreadon de tiaj maŝinvortaroj.

La plej grava paŝo en la evoluigo de instruprogramoj por Esperanto estas la interŝanĝo de ideoj kaj informoj. La plej taŭgaj organoj por diskonigi tiujn informojn eble estas la *Internacia Pedagogia Revuo* de ILEI, kiu havis bonan artikolon de Ray Gerard en 1986 n-ro 3, kaj la revuoj de la komputadaj organizoj: KompRo (vd. enkadran tekston) kaj la komputista sekcio de ISAE kiu eldonas *Fokuso* (vd. dorskovrilan anoncon).

Derek Roff

[Ekzistas ankaŭ la Komput-Inĝeniera Samideana Organizo Japana (KISOJ), kiu eldonas bele faritan dumonatan revuon Ŝmac'! *— adreso ĉe Hayasi Kaneyuki, Oka-Higasi-mati 14-7, Hirakata-si, 573 Japanio.]*

Kion ni faru?

Survoje al realigo de Terminologia Esperanto-Centro (TEC)

Jen la tria artikolo de Wera Blanke, kompletiganta serion pri terminologio kies antaŭaj eroj aperis en majo (p.83-85) kaj decembro (p.207-208) pasintjare. Prezentinte tie la celojn kaj nunan staton de internacia fakvorta normigado, ŝi nun pluiras al la situacio en Esperanto, al la rapide konkretiĝantaj planoj por Esperanta terminologia instituto, kaj al ties taskoj kaj perspektivoj.

1. Konscii pri nia tradicio

100-jariĝo povas doni motivon por fieri pri atingaĵoj, ankaŭ sur faklingva tereno.

Pri la kontribuoj de **Wüster** kaj **Drezen** al la internacia terminologio ni jam aludis en la dua artikolo . Sed valoras memori ankaŭ, ke pri la **mallongigoj por lingvoj** (per unu aŭ du literoj), pri kiuj ISO publikigis sian unuan normon en 1969, la Esperanto-Movado tiam havis jam 40-jaran tradicion — kaj la ĉefaj trajtoj de la Esperanta sistemo estis transprenitaj al la internacia norma sistemo.

Ankaŭ la kompreno, ke por unuecigo (normigo) de terminoj necesas ĝenerale validaj principoj, ekestis 40 jarojn pli frue inter esperantistoj-sciencistoj ol en nacilingvaj normkomisionoj. En 1911 Ch. **Verax,** tiam Direktoro de la Akademia Sekcio por Scienca kaj Teknika Vortaro, publikigis ĉi-teman artikolon en la *Oficiala gazeto esperantista:* "Propono pri Terminologiaj Fundamentaj Principoj por la scienca lingvo en Esperanto". Samtempe li kunlaboris en la scienca kaj teknika komisio de la Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISEA), kiu sub gvido de **M. Rollet de l'Isle** eldonis broŝuron *Konsilaro por la farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj* (1911, Kötzschenbroder/Dresden). Tiu kunlaboro inter ISAE kaj la Akademio fariĝis tradicia, kaj la komuna "Terminologia Centro" sub gvido de Rudolf **Haferkorn** ludis tutmovade gvidan rolon por la Esperanto-terminologio. Inter 1949 kaj 1961 en *Scienca Revuo* aperis pli ol 60 artikoloj, studoj, recenzoj kaj aliaj kontribuaĵoj pri terminologiaj temoj, plejparte el la plumo de Haferkorn. Li varbis por disvastigo kaj apliko de "La dekuma klasado" (nun Universala Dekuma Klasifiko = UDK), diskutis kun Wüster kaj atente sekvis la progresojn de ISO TC 37. Kune kun A. **Albault,** la nuna prezidanto de la Akademio, li preparis "Laborplanon" por fakvortaristoj, kaj kun K. **Dellian** li kompilis suplementon por *Plena Vortaro,* kiu kiel *Scienca kaj Teknika Terminaro* (STT) aperis en Tokio en 1956 kaj plejparte eniris PIV-on. En 1962 li aperigis bibliografion (surbaze de W. Solzbacher, Novjorko 1949 kaj J.E. Holmström (Unesko), Parizo 1961), kiu listigas 118 fakvortarojn en Esperanto, aperintajn ĝis 1961.

En 1970, pro aĝo kaj malsano, R. Haferkorn transdonis siajn taskojn al Auguste **Broise,** ĝistiama kontrolanto de fakvortaraj malnetoj en TC. Ties ĉefa klopodo estis starigi "Fakterminologiajn Komisionojn" — sed jam en 1974 li neatendite mortis. Nun la orfa TC estis konfidita al Rüdiger **Eichholz,** la iniciatinto de *Slipara Vortaro* kaj de esperantigo de la germana *Bilder-Duden.* Dum la preparo de tiu "Esperanta Bildvortaro" (BV) R. Eichholz kunlaborigis 260 fakulojn, kiuj liveris tradukojn de koncernaj bildkompleksoj. La apero estas anoncita por la nuna Jubilea Jaro. "BV" sendube fariĝos unu el la nemalhaveblaj fontoj por la estonta terminologia laboro, apud PIV, STT kaj ĉiuj aliaj ĝis nun aperintaj unu-, du- aŭ plurlingvaj terminaroj. (E. Ockey en sia bibliografio (1982) pri 896 Esperanto-vortaroj mencias 260 da ili; intertempe la nombro konsiderinde kreskis kaj nova listo nepre necesus!)

Certe tiuj materialoj ne estos senkritike transpreneblaj, sed necesos ilin serĉi, esplori, eble re-eldoni kaj konsulti dum evoluigo kaj ĝisdatigo de nia faka vorto-trezoro. "Konscii pri nia tradicio" ankaŭ signifas: alproprigi la heredaĵon, kiun postlasis niaj antaŭuloj.

2. Diskuti la ĝeneralajn problemojn de Esperanto-terminologio

Sed niaj antaŭuloj ankaŭ heredigis al ni kelkajn specialajn problemojn, nesolvitajn, akriĝantajn. Ekzemple la demandon: ĉu dum kreado de novaj (fak-)vortoj ni sekvu la vojon de **skemismo** aŭ de **naturalismo?** Kun la unua nocio ofte ligiĝas tiuj de "reguleco" kaj "logikeco", kun la dua "internacieco" kaj "facila komprenebleco por ne esperantistoj". La pledantoj por la dua vojo admonas, ke Esperanto ne tro forfremdiĝu de la ceteraj lingvoj; la apogantoj de la unua, ke ĝi ne perdu sian esence propran karakteron. Lastatempe kelkaj artikoloj kaj leteroj en la revuo *Esperanto* tuŝis tiun debaton. Oni povas aserti, ke la vero kuŝas en la mezo. Sed: kie precize? Ĉu kelkaj eseoj sufiĉas por klarigi la problemon?

Ekzistas proponoj, strikte diferencigi inter komunuza kaj faka lingvoj — eĉ projekto pri aparta "Fundamento" por la scienc-teknika terminaro kaj

aliaj, pli-malpli geniaj reform-projektoj. Ĉu nu ignoru ilin kaj daŭrigu per pli-malpli akcepteblaj, sed neeviteble meznivelaj kompromisoj? Kiu kapablus objektive esplori kaj pritaksi la ambiciajn proponojn, por trovi la eble raciajn trajtojn? **Terminologiaj principoj** (pli precize: postuloj al la terminaro) ekzistas, ĝenerale akceptitaj kaj validaj por ĉiuj lingvoj. Sed precizeco kontraŭas al koncizeco, internacieco al vortara ekonomio, tiu al unusignifeco ktp. ISO/R 704 saĝe rekomendas, ke en kazo de reciproke kontraŭaj principoj oni esploru, kiu havu la prioritaton. Bone, sed kiu decidos? Diversaj fakuloj preferos diversajn kriteriojn, venos al diversaj konkludoj, proponos diversajn terminojn — kaj jam ekestas sinonimoj (superfluaj), kiuj malhelpas la interkompreniĝon.

dukojn el Esperanto ĉe nacilingvaj fakrevuoj. Akiri tian renomon per bonkvalita laboro, respektindaj rezultoj kaj konvenaj rilatoj al la faka publiko — ĉio ĉi estas taŭga preparo por interesigi la kolegaron pri apliko de Esperanto. Male, sen tiuj antaŭkondiĉoj, eĉ la plej entuziasma varb-kampanjo ne nur estos vana, sed povus grave malhelpi la sukceson.

Fiaskige estus, kvazaŭ kun verda flago en la mano kaj la himno sur lipoj enpenetri sciencajn rondojn insistante pri tuja venko! Tiu averto speciale validas, se temas pri alproksimiĝo al la medio de nacia kaj internacia terminologia normigo. Se oni sukcesas tie kunlabori en faka (sub-)komitato por la propra etna lingvo kaj akiri spertojn kaj reputacion, tiam eblas trankville atendi taŭgan momenton por prezenti ankaŭ la avantaĝojn de planlingvo. Tamen

KIOM DA ESPERANTISTOJ EN LA MONDO?

Ne forgesu partopreni nian konkurson lanĉitan en la aprila numero (p.69). Ĝi estas tute serioza sociologia esploro! Jam komencis alveni la reagoj — kial ne aldoni la vian? Eble premio atendas vin...

En *Esperanto* 1986/p.210 vi povis legi pri la propono de R. Eichholz. Li opinias, ke daŭra diskuto helpe de elektroniko, publikigo de ĉiuj argumentoj por kaj kontraŭ iuj terminoj ebligos al la uzanto elekton de la plej taŭgaj solvoj. Plena libereco solvos la terminologiajn problemojn. Kontraste al tio B. **Golden** (en *Planlingvistiko* n-ro 17, p. 9-14) konfesas sian simpation por "lingvopapo", kies decidoj, kvankam arbitraj, eĉ diktatorecaj, estu devigaj "por ĉiuj samtempe kaj senescepte". Kiu pravas?

Krom tiuj kaj multaj aliaj demandoj, kiuj speciale koncernas Esperanton, ekzistas aliaj, komunaj por ĉiuj lingvoj. Ĉi-rilate ni ne estas solaj...

3. Kunlabori kun la ekstermovada mondo

Ekzistas ja pluraj eblecoj kunlabori kun neesperantistaj fakuloj je reciproka utilo.

Unu el ili estas la tradukado de nacilingvaj artikoloj por Esperantaj gazetoj. Por tio necesas "nur" faka kompetento kaj bona lingvoscio. Aldone bezonatas renomo en fakaj medioj aŭ almenaŭ sufiĉa lerteco en la traktado kun redakcioj, por akceptigi trarekomendindas antaŭ tiaj kontaktoj interkonsenti kun la TEC-estraro (vd. sube).

Kaj plua rekomendo utilos, speciale se iu interesiĝas ankaŭ pri la teoria flanko, pri la terminologio kiel scienco: nepre lernu la anglan! Ni ja devas vivi en la mondo kia ĝi estas, antaŭ ol reformi ĝin laŭ niaj deziroj — kaj **la** lingvo de terminologio nuntempe estas la angla!

4. Aniĝi en la Terminologia Esperanto-Centro

Se la Komitato de UEA konsentos la proponojn de la preparkomitato, dum la Universala Kongreso en Varsovio okazos la Unua Konferenco de Terminologia Esperanto-Centro.

Per la rezolucio de Aŭgsburgo (*Esperanto* 1985/p.146 kaj 1986/p.85), kiu donis al la Esperanto-Movado novan ŝancon por realigi malnovajn planojn, UEA komisiis sian Terminologian Sekcion (TeS), prepari la fondon de "Esperanta termino-normiga instituto". Intertempe la TeS-anoj faris sian eblon por interesigi sciencistojn kaj fakulojn Esperanto-regantajn pri la afero. La nombro de

ĝiaj registritaj kunlaborantoj kreskis al 75, sed malmultaj inter ili pretas engaĝi sin en la gvida-organiza flanko. Tial kelkaj el la planitaj sekcioj, kiel tiu por bibliografio kaj dokumentado, por interfakaj rilatoj, por informado kaj instruo, provizore restas vakaj.

La "kerno" de la nova institucio tamen ekfunkcios per tri relative memstaraj fokusoj:

1. La **sekcio por normigo,** kiu zorgos pri klasifiko de temoj, determinado de prioritatoj, observado de ellabora kaj aproba procedoj kaj aliaj rilataj problemoj. Ĝin gvidos kolektivo en Ĉeĥoslovakio, kie la spertoj pri terminologia laboro kaj normigo estas relative progresintaj.

2. La **sekretariato** en Budapeŝto registros la kunlaborantojn, zorgos pri ilia informado, pretigos kaj distribuos perkomputilajn dosierojn, kaj provos mildigi transpagajn problemojn — ĉar unu el la antaŭkondiĉoj por fruktodona laboro ja estas, ke ĉiuj kunlaborantoj povu akiri la necesajn materialojn.

3. La **reto de reprezentantoj:** ne nur pro la diferencaj etnolingvaj influoj sur Esperanton, sed ankaŭ pro diverseco de spertoj, kondiĉoj kaj eblecoj de terminologia laboro gravas la internacieco, laŭeble tutmondeco de TEC. Ĝin realigi povos nur reto de landaj reprezentantoj, kiuj bone orientiĝas pri avantaĝoj kaj problemoj de sia regiono kaj estas firme integritaj en siaj landaj Esperanto-asocioj. Surbaze de komunaj principoj ili helpu kaj konsilu al siaj samlandaj kolegoj dum realigado de la konkreta terminara laboro.

Kion signifas "aniĝi"? TEC ne havos "membrojn", sed konsistos el "gvidantoj" (kiuj zorgas pri organizado kaj fakotransiraj taskoj) kaj "kunlaborantoj", kiuj prilaboras la terminarojn de siaj fakoj. Laŭ peto ĉiu interesito ricevos enketilon, per kies plenigo li fariĝas "ano". Tiuj "aniĝoj" estas dezirindaj, ĉar ili tre faciligas la administradon kaj organizadon — sed en publikaj diskutoj pri normproponoj kompreneble rajtas partopreni ankaŭ ne-"anoj"!

5. Donaci al "Fondaĵo Wüster"

Kvankam laŭ la nuna evolustato gvidantoj kaj kunlaborantoj de TEC laboros honorofice, necesas financa bazo por realigi la planitajn taskojn, kiel ekzemple represo de elĉerpitaj "klasikaĵoj" de fak-aplika Esperanto, subvenciado de TEC-eldonaĵoj, speciala helpo por TEC-anoj kun transpagaj problemoj ktp. Pro tio la aŭgsburga rezolucio samtempe kun fondo de normiga institucio proponis establon de speciala fondaĵo, kiu portu la nomon de Eŭgen Wüster (vd. *Esperanto* 1986/p.228). Intertempe la fondaĵo instaliĝis. Ĝi servos ekskluzive por la celoj de terminologia normigo sub gvido de TEC. Unu el ĝiaj plej honoraj specialaj taskoj estos ebligi la eldonadon de la dua parto de *Enciklopedia Vortaro* de E. Wüster, se la altaj pretendoj pri teknika realigado estos garantieblaj. Por okcidentlandanoj estas facile transpagi donacojn: ili ĝiru ajnan sumon al la konto de UEA, kun indiko: "por Fondaĵo Wüster". Donacoj el aliaj landoj estus same bonvenaj, sed solvo por transpagaj problemoj ankoraŭ estas serĉata.

6. Eklabori

Ĝis plena funkciado de la Centro certe pasos iom da tempo. Ĝi ankoraŭ ne povas servi per bibliografiaj indikoj por ĉiuj fakoj, per serio de pri-teoriaj seminarioj kaj praktikaj kursoj, per interplektita, subtenanta reto de reprezentantoj-perantoj. Sed tuj eklabori tamen eblas al ĉiu interesito.

● Por orientiĝi pri bazaj scioj de terminara laboro mendu la broŝuron *Terminologia Kurso* de J. Werner (ĉe J. Laube, Kratochvková 969, Roudnice n. L., CS-413 00 Ĉeĥoslovakio, aŭ ĉe la Libroservo de UEA (12,00 gld.) Por alproksimiĝi al la problemaro sen tempoperdo: pripensu dum via ĉiutaga laboro, kiel vi tradukus terminojn kaj faktojn de via profesio.

● Por prepari la praktikan laboron sur via faka tereno kolektu ĉiujn akireblajn materialojn (libroj, artikoloj, terminaroj — Esperantaj kaj etnolingvaj) koncerne vian fakon. Ne forgesu noti bibliografiajn indikojn pri ne-akireblaj materialoj! Por faciligi la laboron de viaj kolegoj, aldonu glosaron, se vi tradukas aŭ originale verkas kaj devas krei novajn terminojn.

● Por ricevi regulajn informojn kaj partopreni en la aktiva terminologia laboro aniĝu en TEC (ĉe I. Bujdoso, sekretario de TeS, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario). Se vi jam ek- aŭ finpreparis terminaron, bonvolu tion anonci al la sama adreso.

● Se vi havas specialajn demandojn pri normigo de Esperanto-terminologio, skribu al M. Malovec, Charkovská 7, Brno, CS-625 00 Ĉeĥoslovakio.

● Se vi interesiĝas pri kunlaboro por baza terminaro *Tekniko Ĝenerale,* urĝe kontaktu: Inĝ. J. Pospišil, Lublanská 49, CS 120 00 Praha 2, Ĉeĥoslovakio.

● Se vi detale volas informiĝi pri la evoluo de internacia terminologi-normigo: lernu la anglan!

● Se vi volas materie subteni la laboron de la Terminologia Esperanto-Centro: ĝiru al "Fondaĵo Wüster"!

Se vi volas partopreni la unuan TEC-konferencon dum la Jubilea UK, mi ĝojus pri via informo!

Wera Blanke
O.-Nagel-Str, 110, Pf 113-05
DDR-1141 Berlin, Germana D.R.

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn; sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

LINGVO-EVOLUO:

Planlingvo estu planata

Mi konsentas kun s-ro Corsetti (*Esperanto* 1987/p.33), ke "vivu la simpla Esperanto", sed ne pri lia sinteno ke la Esperanto parolata de la esperantistoj estas "normala, simpla kaj logika", kaj tial akceptinda kiel ĝusta.

Esperantistoj estas ne pli normalaj, simplaj kaj logikaj ol la cetero de la homaro, kaj vidu kio okazis, kaj okazadas, al la lingvoj parolataj de ĉi tiuj! Por ke Esperanto konservu siajn plej valorajn kvalitojn, simplecon kaj (relativan) logikecon, necesas ke ĝia evoluo respektu la regulojn de la Fundamento, evidente. Krome ĝi atentu plian "regulon" de Zamenhof aldonitan: la Esperanto de la fruaj jaroj restu ĉiam legebla kaj komprenebla ankaŭ por la plej lastaj adeptoj. El ĉi tio sekvas, ke la radikoj kaj vortoj envortarigitaj konservu sian originalan signifon. Se venas tempo, kiam tiu signifo ne plu ludas rolon en la aktuala vivo, tiam eble la radiko surprenu alian, ligitan signifon kaj la unua signifo ricevu en la modernaj vortaroj signon pri arkaikiĝo.

La erara uzo de "komputilo" por difini la elektronikan aparaton verŝajne fontas el nekompleta kompreno de la angla lingvo flanke de siatempa kompilinto de komputora terminaro. La fakto, ke la plimulto de la esperantistoj akceptis kaj uzadas ĝin, ne devas — eĉ devas ne — sankciigi ĝian uzon nek influi ĝian oficialan akcepton. Kvankam mi estas favora al, kaj subtenas la elekton de la termino "komputoro", al mi malpli gravas, kiun el la aliaj proponoj oni elektas, ol ke estu konstatita la bezono de tute nova radiko por priskribi tiun fenomenon de la elektronika erao, kaj ke surbaze de tiu konstato estu oficiale elektita ĝusta termino.

Audrey Childs-Mee (Nederlando)

Aligu solidare ĈInojn al la Jubilea UK!

Ni, kelkaj kongresintoj en la pekina UK, multe pripensis, kiel esprimi nian dankemon al la ĉinaj esperantistoj pro tiu neforgesebla evento. Tiel venis al ni la ideo starigi Amikan Rondon por Ĉinaj Esperantistoj (ARĈE). Nia rondo celas helpi ĉinajn geamikojn plifirmigi kontaktojn kun la internacia movado kaj por tio ni invitas ankaŭ vin.

La plej urĝa el pluraj konkretaj ideoj estas **solidara aligo al la Jubilea UK.** Kontraŭ la simbola pago de 30 guldenoj, UEA pretas aperigi la nomon kaj adreson de via ĉina amiko en la Kongresa Libro, kaj via amiko ricevos propran ekzempleron de la libro kiel belan memoraĵon pri la Jubileo de Esperanto. (Kompreneble vi rajtas pagi plurajn solidarajn aligojn, se vi volas!) Nur rapidu: la pagoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ankoraŭ en junio. La poŝtĝirkonto de UEA estas 378964 (Nederlando).

Nora Reinders (Nederlando)

Red.: *Tian solidaran aligon vi povas donaci ankaŭ al aliaj triamondaj esperantistoj, se vi tuj reagos al la alvoko de s-ino Reinders. La tarifo restas sama.*

Mi pretere menciu, ke la Kongresa Libro efektive ne *dissendiĝos antaŭ la kongreso, kiel promesite en la aprila Kongresa Komuniko, sed atendos la kongresanojn surloke. Ni profitu la prokraston por subteni pli vaste la jenan iniciaton!*

Endas racia diskutado

Korajn gratulojn pro bonege redaktita februara numero pri la temo "interlingvoj de la mondo". Ĝi estis vere pens-instiga.

Mi ĝojas, ke vi ebligis al prof. Lapenna satire diskonigi siajn ideojn. Por mi la skemisme formitaj *juriko* kaj *internacirilatiko* estis senklarige komprenebla j, sed ne la naturalisme heredita *jurisprudenco,* faktermino, kiu pensigis min pri prudenteco de juristo, sed ne pri la tri (!) signifoj atribuitaj al tiu termino en PIV. Ili estas aparte lernendaj, kaj tio malfaciligas nian lingvon.

La alvokon de Renato Corsetti mi plene subtenas. La pliriĉigo de nia lingvo dum la lastaj jardekoj okazis ĉefe naturalisme. Tial mi bonvenigas, ke nun pli kaj pli ofte lingvo-praktikantoj postulas, ke oni kreu novajn terminojn prefere skemisme per kunmeto de jam ekzistantaj radikoj. Tio estas tute laŭ-Fundamenta agado, kiun ankaŭ mi aplikis, kiam mi kompilis la tradukon de la *Esperanta Bildvortaro.*

La radiko *komput'* havis diversajn signifojn en ıia lingvo: En la *English-Esperanto Dictionary* de

Rhodes (1908) ĝi estas sinonimo por *kalkul'; computer* en ĉi tiu vortaro estis *elkalkulisto*(!). Wüster utiligis la saman radikon por la tiam nova nocio, kiu estis registrita en kelkaj vortaroj kaj PIV. Sed nun (ekde 1967 precize — vidu *Esperanto* 1967/p.2) oni ofte atribuas al ĝi tute alian signifon, nome "trakti informojn per aŭtomato", kaj oni nomas la ilon por tion fari *komputilo*. Tio pro diversaj kaŭzoj ne estas rekomendinda. Se ni ne atentigas ordinarajn lingvouzantojn, ke *komputilo* esprimas tre ĝeneralan nocion, ni permesas malpreciziĝon eĉ degeneron de nia lingvo. Laŭ normo pri komputado de la Internacia Normiga Organizo (ISO), komputado povas esti plenumata per homaj **aŭ** aŭtomataj rimedoj. Se ni deziras, ke nia lingvo restu preciza kaj taŭga por aŭtomata tradukado, ni devas krei trafajn terminojn, kaj tiuj devus akordiĝi kun terminoj en internaciaj normverkoj. Mi subtenas, ke ni uzu la terminon komputado por "traktado de informoj", sed logika sekvo estas, ke ni bezonas alian terminon, se ni alcelas nur la aŭtomatan komputadon. Do ni uzu ambaŭ vortojn: *komputoro* kaj *komputilo*.

Necesas, ke ni racie kaj publike diskutu pri ĉiuj imageblaj metodoj, por krei la multegajn bezonatajn terminojn. Tio nun eblas pere de Pekoteko. Se ni nur emocie klopodas trudi iujn terminojn, kaj se ni volas permesi ke lingvouzantoj, kiuj nenion scias pri la prezentitaj argumentoj, decidu kiujn terminojn ni uzu, tiam tio signifas morton de la planlingvo Esperanto.

Rüdiger Eichholz (Kanado)

ROLO DE ESPERANTO:

Ni praktiku praktikismon!

Mi verkas ĉi tiun leteron respondante al du artikoloj en *Esperanto* februaro 1987: "Esperanto kaj la angla: ĉu konkurantoj?" kaj "Praktikismo aŭ idealismo?", la elektitaĵoj el la artikolo de James Fallows. Mi jene protestas la fuŝan malseriozan traktadon de tre serioza temo: la aktuala kaj estonta rolo de Esperanto kompare al tiu de aliaj mondlingvoj, ĉefe la angla.

Per kvazaŭ magia gesto via malaperas la praktikaj bezonoj de komerco, scienco, plibonigo de ekonomia statuso, la praktika valoro de lingvolernado, eĉ la tuta materia mondo, kaj ni trempiĝas en la saman malfreŝan idealisman kaĉon. Kia memgratula blufado! Kia filistreco!

Nia idealisma eskapismo, nekompetenteco pri lingvoproblemoj, amatoreca propagandado, kaj ĝenerala sektismo laŭmerite portas al ni la rikanojn de la ekstera mondo. La kultura sterileco, kiun kaŭzas dogmeco, forpelas multajn inteligentajn homojn de Esperanto; ĝi forpelemas eĉ jamajn esperantistojn. Ni devas kuraĝe elpensi la sekvojn de la du kontraŭaj faktoj, ke Esperanto ne kapablas anstataŭi la anglan lingvon sed tamen ne formortas, ĉar ĝi evidente estas utila komunikilo por miliono da homoj kaj ne nur anstataŭa religio por filistraj eskapemuloj.

Esperanto esence funkcias kreante alternativajn komunikretojn, kiuj suplementas sed ne anstataŭas la komunikretojn de aliaj lingvoj de pli vasta komunikado. Pripenso de tiu rolo kondukos al konkludoj pri varbaj kaj fakaj strategioj, pri pli efika utiligo de niaj magraj rimedoj kaj forigo de utopiisma pensado pri kiu oni fordisipas monon, tempon kaj forton.

Pro utopiisma pensado, oni konsideras nur la nerealigeblan finan celon de Esperanto, ke ĝi estu la sola dua mondlingvo por ĉiuspeca internacia komunikado, kaj preterlasas la aktualan materian mondon. Tial oni strebemas konstrui Esperantan mikrokosmon de la ekstera mondo en ĉiu fako. Ĉar ekzistas scienca literaturo en naciaj lingvoj, ni kreu sciencan literaturon en Esperanto. Se oni instruas organikan kemion, astrofizikon ktp. en naciaj lingvoj, ni provizu samfakajn lernolibrojn en Esperanto. Se ekzistas literaturaj kaj filozofiaj enciklopedioj en naciaj lingvoj, ni eldonu similajn grandiozajn enciklopediojn en Esperanto. Se ekzistas naciaj fakaj asocioj pri scienco, filozofio, bibliotekologio ktp., ni starigu samfakajn asociojn esperantistajn sen ia ajn esplorado de la efektivaj bezonoj, kiujn ĉi tiuj asocioj traktos.

Tiuj, kiuj vivas en la reala mondo, ne en revmondo, klopodos esplori efektivajn komunikretojn kaj lingvoproblemojn kaj ne kontentos pro nura abstrakteca rezonado. Elitaj sciencoj neniam uzos Esperanton. Astrofizika literaturo en Esperanto estas same senutila kiel en la vaska. Se estos ŝancoj je malpli centralizitaj, ne-elitaj sciencoj, do provu. Sed ne malŝparu rimedojn, ekz. en tradukado kaj eldonado de sciencaj lernolibroj kiam mankas merkato kaj mankas okazo por utiligo de Esperanto en profesia esplorado kaj eldonado. Oni bezonas aktuale nur terminologian laboradon kaj popularsciencan literaturon. Ĉio alia estas frenezaĵo.

Ekster scienco, teknologio kaj komerco la angla lingvo ne tenas monopolon. Oni eltrovu kaj informu pri aferoj, kiuj ne kutime saltas trans lingvojn. Oni traduku kaj resumu artikolojn kaj librojn por kiuj bezono ekzistas pro nacilingva manko. Oni forgesu pri Shakespeare; traduku indajn verkistojn, kiuj ne kutime ricevas tradukojn. Oni faru kontaktojn kaj informadon, kiaj povus ekzisti nur per Esperanto. Ŝtopu la breĉojn en aktuala internacia komunikado kaj rezignu utopiajn fiaskojn.

Ralph Dumain (Usono)

ESPERANTO EN AFRIKO:

Afriko bezonas pli ol entuziasmon

En *Esperanto* de februaro 1987 aperis du tekstoj pri Afriko, kiujn mi dezirus komenti.

La dua estas brila sintezo de la tuta afrika lingvoproblemo, verkita de persono kun grandaj afrikaj spertoj kaj kun objektiva pritaksado pri pasinteco kaj estonteco de Afriko. Tiu teksto klare montras, ke en la Esperanto-movado ne mankas la spertuloj kiujn oni bezonas por bone funkciigi iun komisionon pri Afriko. La revuo meritas gratulojn pro tiu eminenta teksto.

La unua teksto estas entuziasma kaj esperantomovadista, sed verkita de persono kiu konas Afrikon per leteroj, per legado kaj per nemistaksebla endoktriniĝo. Ĝia enhavo klare evidentigas, ke en multaj landoj de Eŭropo la intereso por Afriko estas iu moda fenomeno (kaj oni do povas demandi al si, ĉu ankaŭ en la Esperanto-movado la afrika afero ne estas same kvalifikebla?).

Efektive, en mia dua jaro de evoluhelpo en unu el la plej malriĉaj landoj de Afriko, mi ne havas la impreson ke Afriko "...havas amarajn spertojn kaj ĝiseternajn fimemorojn pri superregado, interalie kultura kaj lingva." Mi ankaŭ ne povas konfirmi, ke "...la socio en Afriko por ĉiam brulstampiĝis de la travivo de la koloniismo" — eĉ male, ĉar ĝis nun neniu afrikano riproĉis al mi, kiu ankaŭ antaŭ tridek jaroj laboris en Afriko, ke mi estus "...senkonscia pri la misuzado de potenco." Same estas erare pensi, ke la afrikanoj devas "diskuti ...kun malplena stomako" (hieraŭ vespere iu zairiano argumentis al mi: "kiam oni malsatas, oni devas manĝi").

Dum la cent jaroj de la Esperanto-movado multaj mispaŝoj jam estas faritaj sekve de nepravigebla entuziasmo, de naiveco kaj de ideologismaj altrudiĝoj. Samajn mispaŝojn minacas la ĝermiĝo de movado en la mondparto kie ĝi ĝis nun apenaŭ ekfloris. Tio evidentiĝas el la broŝuroj kiujn UEA eldonis kaj el kelkaj bonintencaj sed mistrafaj agadoj. Ni certe ne kredigu al afrikanoj ke la intereso por Esperanto estas la metodo por trovi en Eŭropo aŭ en Usono iun bonfaranton, de kiu oni povas profiti, aŭ ke Esperanto mirakle malaperigos la neceson lerni aliajn lingvojn, aŭ ke ni protektas iliajn kulturojn per tiu lingvo. Male, ni montru al ili, kio Esperanto kaj ĝia movado estas ...aŭ devus esti.

Kaj antaŭ ol ni kongresos en Afriko, UEA serioze analizu, kiuj estas la argumentoj por kaj kontraŭ. Afriko havas siajn ĉarmojn, sed ankaŭ siajn seniluziigojn. Kaj ne estas la entuziasmo kiu solvos tiujn ĉi lastajn.

Malgraŭ mia kritiko pri tiu teksto, per kiu mi fakte trafas bonan amikon kiun mi ege respektas, mi volas substreki ke ĝi ankaŭ enhavas tre pozitivajn frazojn. La ĉefa laŭ mi estas jena: "Sed ĉu ni ne lasu al la afrikanoj mem difini siajn problemojn?" Kaj jen denove la dua teksto estos bona gvidlinio por kompreni ilin.

W. De Smet (Ruando)

Du vojoj por la verda venko

Ĝis nun fervoruloj, strebantaj esperantistigi afrikanojn, sekvis nerektajn, serpentumantajn padojn tra dezertoj kaj ĝangaloj, kaj trafis en unu sakostraton post alia. Estas du pli rektaj vojoj, kiuj, se ne pli rapide ebligantaj la venon de la verda venko en Afrikon, almenaŭ promesas pli efike certigi ĝin.

Por ke afrikaj registaroj, edukaj instancoj kaj aliaj kulturaj organizaĵoj konsciu pri la valoro de Esperanto por internacia komunikado, estas necese unue atingi oficialan agnoskon de la lingvo en la jam evoluintaj landoj. La homoj en la Tria Mondo vole-nevole sekvos la ekzemplon por ne postresti. Kiam Esperanto estos uzata fare de pluraj eŭropaj registaroj kaj ankaŭ gravaj internaciaj organizaĵoj, afrikanoj sen tro da persvado alprenos la lingvon, ĉar tiam ĝi havos materiajn avantaĝojn. La fiasko de provoj dum cent jaroj oficialigi Esperanton en Eŭropo ne estas kuraĝiga ekzemplo por afrikaj registaroj. Anstataŭ la Fondaĵo Azio-Afriko, pli urĝe bezonata estas la Fondaĵo Eŭropo!

Por tiuj, kiuj obstine opinias, ke oni ĉiuokaze devas porti Esperanton al la afrikanoj nun, mi proponas la duan vojon. Ili ne plu malŝparu sian tempon en seminariaj ĉambroj, ellaborante belajn sed nerealigeblajn planojn. Ili aktiviĝu same kiel religiaj misistoj en la samaj regionoj de la Tria Mondo, kaj preparu sin por vojaĝo al unu el la landoj kaj restado tie dum 20, 30 aŭ eĉ 40 jaroj. Surloke ili starigu lernejojn, konstruu malsanulejojn, planu agrikulturajn bienojn kaj fondu industriajn entreprenojn. Dum la indiĝenoj ricevas ekonomiajn kaj edukajn avantaĝojn, oni povas ankaŭ instrui Esperanton. Tiu ĉi speco de preskaŭ vivdaŭra kampanjo posedos kontinuecon, tre bezonatan trajton, kiu ĝis nun mankis en ĉiuj provoj enkonduki Esperanton en Afrikon. Mia plano diferencas disde aliaj, ĉar ĝi emfazas ekde la komenco plibonigon de la vivo de afrikanoj.

Instrui Esperanton donas al afrikanoj neniun ajn materian avantaĝon. Ĝuste tion ĉi ili bezonas kaj postulas nun.

Bernard Golden (Hungario)

Roget superita en Esperanto

Sisteme ordigita vortaro, komp. Michele Mariano (1907). Parizo: Plejado-Gabrielli, 1986. 526p. 21 × 33 cm. Scienca eldonserio n-ro 3. Prezo: 113,70 gld.

La leganto pardonu la recenziston, se li komencas la recenzon per raporto persona. Antaŭ pluraj jaroj mi intencis kompili laŭteman vortaron kaj tiucele komencis surslipigi la tutan PIV-on*, kapvortojn kaj derivaĵojn. Ĉio iris glate dum temis pri sciencaj-teknikaj terminoj. La obstakloj aperis ĉe la klasado de homaj agoj, pensoj, sentoj ktp. Ne mirinde, ĉar kiel skribas la aŭtoro en sia antaŭparolo: "Tiu problemo (de vortaroj laŭtemaj) jam okupis multajn lingvistojn dum la pasintaj jarcentoj", kaj citante B. Migliorini: "tiuj provoj ne donis la esperatan rezulton." *Roget's International Thesaurus,* la plej bona de mi konata tia vortaro, kiun mi prenis kiel modelon, ne kontentigis min. Malgraŭ sia pli ol centjara ekzisto kaj sinsekvaj plibonigoj ĝi entenas mallogikaĵojn, ekz-e nutrado, sekreciado, ekskreciado sub "movo rilate direkton", do sub la sama ĝenerala titolo de iu ajn fizika translokiĝo.

Dum la UK de 1979 en Lucerno, pere de prof. Waringhien, mi sciiĝis pri Esperanta vortaro per temo-tabeloj verkata de d-ro Mariano kaj mi kontaktis tiun, cele eventualan kunlaboron. Li ĝentile sendis al mi kelkajn paĝojn de la verko kaj mi — malĝentile — dubis, ke li povus sukcesi pri eldono, ĉar ĝi tro ŝvelus pro la entenataj difinoj. Kiel aliaj "tezaŭroj", mi volis ĝin ekskluzive kun la nudaj vortoj, dum li insistis pri la "rolo esenca de la difinoj". Mi nun devas honti pri mia skeptikeco kaj agnoski ne nur la kolosan volforton de d-ro Mariano, sed ankaŭ la kuraĝan entreprenemon de la eldonisto, d-ino Gabrielli.

La principo sur kiu baziĝas SOV estas la reprezentado ort-aksa. Sur la abscisoj (horizontale) staras la funkcio aŭ kvalito de la vortoj; sur la ordinatoj (vertikale) ties gradoj (kvantoj) ĝis la antonimoj (negativaj kvantoj). Tiuj ordinatoj entenas vortojn kun samaj aŭ proksimume samaj sencoj, grade malproksimiĝantaj ĝis plena malo, tiel prenante la lokon de vera vortaro de sinonimoj kaj antonimoj — jen gravega helpilo por verkistoj. Sed ne en tio kuŝas ĝia ĉefa merito — estas "la sinsekvo de la funkcia evoluo, de la reprodukto ĝis la psika/esprima", kiu konsistigas la pioniran leksikografian trabreĉon, neniam antaŭe atingitan.

Cetere la nomo "vortaro" misgvidas. Escepte ĉe la fina alfabetorda indekso de ĉiuj entenataj vortoj, oni pli ĝuste nomu ĝin "difinaro", ĉar la difinoj venas unualoke kaj karakterizas la sinsekvon kaj afinecon de la ideoj, dum la vortoj formas nur ilian eksteran aspekton. Tial SOV povos facile roli kiel modelo por similaj etnolingvaj verkoj, per traduko de la difinoj kaj serĉado de ĉiuj vortoj ilin adekvate reprezentantaj.

Malgraŭ la granda intelekta fortostreĉo necesa por evoluigi la ideojn laŭ sinsekva racia ordo, kaj la enorma fizika laboro por ĉion surpaperigi, kiun ĉion li tre modeste nomas "mia ne malpeza entrepreno", la aŭtoro rekonas, ke li ellaboris sole prototipon, t.e. "tekston, kiun la sperto montros kiel pliboniĝeblan". Espereble anstataŭ la eternaj pliboniĝebluloj baldaŭ sin anoncos kompetentuloj, por liveri etnolingvajn ekvivalentojn, levante la prestiĝon de Esperanto al alteco ankoraŭ neniam atingita, pere de ĝia funkcio kiel baza lingvo por universala kolekto de ideoj, hontigante tiujn, kiuj snobe ŝajnigas ĝin ignori aŭ tiujn, kiuj senpripense, sen sufiĉa kono, ĝin flankenŝovas malestime. Dume ni feliĉuloj jam ekde nun disponas pri tiu gravega verko, nun ne plu malhavebla por ĉiu verkisto zorgumanta uzi la plej trafajn esprimojn por siaj ideoj. Por la ordinarulo ĝi taŭgas kiel iuspeca leksikono, kaj por la fakuloj kiel bazo por ampleksigota fakvortaro.

L.H. Knoedt (Brazilo)

*PIV: *Plena Ilustrita Vortaro.*

Sentoplena poemetaro

Kaj poste, Daphne Lister. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1986. 56p. 14,5 cm. ISBN 0 9505323 5 5. Prezo: 6,60 gld.

La nova poemaro de Daphne Lister ja tiom klare havas ligon kun la antaŭjardeke aperinta poemaro *Ĝis nun,* ke mi ne povis lasi tiun ĉi nelegita.

Ambaŭ verkoj estas presitaj kiel modestaspektaj libretoj, kun nur ioma diferenco rilate al la paĝaspekto, kaj la grandaj magraj literoj "Helvetica" — tre influa parto de la tuta artaĵo — trankvile aspektas por la okuloj.

Temo kiun mi ofte rekonis en la poemoj de *Kaj poste* estas la ofta falseco je esprimo de sentoj en la hodiaŭa socio, kaj laŭ mi, poemo estas tre taŭga ilo por ataki tiun aĉecon de la nuna vivo. Mi ekzemple citu la poemon "Respekto":

Amu min, malamu min,
aŭ emociojn plektu,
Estu indiferenta, sed
pro krist' min ne respektu!

kiu instigas prefere senti ion ajn anstataŭ esprimi la senriskan neŭtralecon.

Ĉu ne indas? Ja tiom ofte oni diras pri iu ke li aŭ ŝi estas afabla homo. Nur tion. Sed, baf! Ĉiuj homoj ekagas afable; gravas nur kiaj ili krome estas, ĉu amoremaj, arogantaj, perfortemaj, sinŝlosemaj, ktp. Ĉar, nura afableco kostas nenion.

La poemo "La fremdulino" montras iun kiu tute ne agas afable:

Cigaredstumpo pendas delipe
Karikaturtipe;
Rutinraŭke ŝi la infanojn admonas,
Kaj mi spionas
Subaŭskulte;
Kiel stulte
Ŝi insulte
Krias.
Kiel mi envias!

Tie ĉi estas bildita iu persono kiu ne provas esti, sed tutsimple estas. Kaj la spektanto tiom estas trafata de ŝia vereco, ĉu el propra deziro aŭ ĉu pro pradeziro tiel esti, ŝi envias? Je multaj poemoj eblas starigi tiajn demandojn.

Same kiel en *Ĝis nun,* ankaŭ en *Kaj poste* iu poemo ne vere meritas sian nomon, ĉar:

Dek sep silaboj
ne nepre formas hajkon
se kunigitaj.

En ambaŭ libroj la tiel indikitaj poemoj, kvankam tre belaj, ne estas hajkoj. Mi montros du ekzemplojn:

Decembraj rozoj
Frostaj fraŭlinoj oldaj
Tro junaj pozoj. (kp)

* *

Mi estas nur ŝel'
Ne fajro mi estas sed
Kamena kahel'. (ĝn)

Rimoj, metaforoj, juĝoj ("tro"), abstraktaĵoj, eldiroj pri sia personeco; jen aferoj kiuj apartenas al la okcidenta poemarto, kaj ne al la rekta, senpera rigardo al la naturo kiel en la japanaj hajkoj.

Eble ne estas tre dece, sed tamen por klarigi mi kompare montras kelkajn tradukojn de japanaj hajkoj:

Olda lageto!
Ran' forlasas la randon,
sono de akvo. (Basho)

* *

Freneza vespo,
pikis la ŝtonan budhon
foje, denove. (Bokusai)

Jen multe pli senperaj rigardoj kaj observoj. Nu, hazarde mi ŝatas hajkojn, do iom peze mi kritikis tiun parteton de la poemaro de Daphne Lister. Sed certe mi ne volas diri ke ŝia verko ne legindas. Kontraŭe, mi ĝojas esti ekkoninta ŝiajn poemojn, kaj esperas ke multaj aliaj homoj, ŝatantoj de Esperanta poezio, same ĝuos renkontiĝon kun ŝia arto.

Jan Exmann (Nederlando)

Ĉina historia dramo

Bronza tigro; historia dramo kvinakta (ĉ. 1940), Gŭo Moĵŭo (Guo Moruo, 1892-1978). El la ĉina trad. Seimin (pseŭd.). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. 122p. Fotoj. Mapo. 22cm. Bind. Prezo: 12,60 gld.

Guo Moruo estas vaste konata figuro en la ĉina kultursceno. Verkisto, poeto, sciencisto, li dekomence partoprenis la novkulturan movadon kontraŭ feŭdismo kaj imperiismo, kaj ricevis honorabundon en Ĉina Popola Respubliko ĝis sia morto en 1978. Ŝajnas, ke li favoris Esperanton, kvankam mi neniam aŭdis, ke li lernis ĝin.

Tiun ĉi dramon li verkis dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, paraleligante kun tio historiajn eventojn de la periodo de Militantoj Regnoj (258 a. K.). Serĉi ekzaktajn analogojn estus amuza ludo, sed mi lasos tion al la leganto.

Simpligite, temas pri neceso haltigi invadantojn kaj pri la interna lukto inter du partioj: reĝo Ŭej volas uzi taktikon de atendismo, en kiu li sukcesas de dek jaroj, dum lia duonfrato Ŝinling proponas fulman frakasfrapon per ĉiuj fortoj. Por atingi sian celon, Ŝinling ŝtelas Bronzan Tigron, simbolon de komandopovo.

Kompare kun aliaj ĉinaĵoj (kaj aliaj neeŭropaĵoj), ĉi tiu verko multe malpli surprizas eŭropan leganton; unue ĉar ĝin portas konata artformo, due ĉar ĝiaj historia fono kaj agaddisvolviĝo neniel pli fremdas al ni ol, ekzemple, la historiaj dramoj de Ŝekspiro. Ĉi tie mi trovis similan etoson kiel en *Makbeto* — intrigojn kaj kontraŭintrigojn, murdon kaj ĝismedolan fatalismon, ke malhonoron oni povas forlavi nur per sangobano (ĉi tie: propra sango). Troviĝas eĉ momentoj de "komika senstreĉiĝo", ekzemple kiam aperas du ebriaj hundbuĉistoj dum oni komplotas.

Sed mi ne volas implici, ke ĝi estas kopiaĵo. Ĝi estas tre originala verko kun tute propra spico. La ĉefrolulo Ĵuĝji estas tipe ĉina heroino, kiu oferas sin por la patrio. Ni ne forgesu, ke ĝi havas ankaŭ certan didaktikan celon.

Rikardo Cash (Francio)

Almanako Lorenz 1987. Rio de Ĵanejro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1987. 144p. 21cm. Ilus. Diverstemaj artikoloj, poemoj ktp. Prezo: 6,00 gld.

100 demandoj kun respondoj pri la bulgara virino, trad. N. Aleksiev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1986. 139p. 20cm. Prezo: 3,90 gld.

Contribution de l'Association universelle d'espéranto a la paix mondiale, La, Ulrich Lins. Roterdamo: UEA, 1986. 14p. 21cm. Broŝ. Documents sur l'espéranto 22F. ISSN 0165-2621. Prezo: 3,00 gld.

Contribution of the Universal Esperanto Association to World Peace, The, Ulrich Lins. Roterdamo: UEA, 1986. 14p. 21cm. Broŝ. Esperanto Documents 37A. ISSN 0165-2575. Prezo: 3,00 gld.

Ĉevalsalto, La, Petar Mišković. El la serbokroata trad. Senad Ćolić. Sarajevo: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, 1986. 88p. 20cm. Ilus. Pri la aerinvado al Drvar en 1944. Prezo: 15,00 gld.

Ĉinio marŝas en insekta mondo, Io Chou. Pekino: Eldonejo Ĉina Perspektivo, 1986. 98p. 19cm. Mallongaj rakontoj en simpla, klara Esperanto de renoma ĉina entomologo. Prezo: 9,00 gld.

Elektitaj scienc-teknikaj verkoj en Esperanto. Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo. 1985. 136p. 19cm. Ilus. Diverstemaj ĉerpaĵoj el Esperantaj periodaĵoj, kun ĉinlingvaj glosoj. Prezo: 12,00 gld.

Espanja Espanja, Vladimir Čerkez. El la serbokroata trad. Vesna Skaljer-Race, kun antaŭparolo de Boĵo Popović. Beogrado: Esperanto-societo "Radomir Klajić". 1986. 36p. 22cm. Poemo de fama nacia verkisto honore al la Internaciaj Brigadoj en la hispana milito. Prezo: 12,00 gld.

Esperanta-ĉina vortaro. Pekino: Ĉina Esperanto-Ligo. 1986. 1071p. 13cm. Prezo: 24,00 gld.

Esperantlingvaj tradukoj de la Sankta Biblio ekde Zamenhof ĝis la nova Ekumena Biblio, Angelo Duranti. Messkirch: Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, 1985. 48p. 21cm. Mimeo. Broŝ. Prezo: 6,60 gld.

Esperanto en nova framo, Albert Goodheir. Coatbridge (Skotlando): Eldonejo Kardo, 1986. 13p. 21cm. Mimeo. Broŝ. Eseo pri la ŝanĝiĝo de mondokonceptoj, premiita en la Belartaj Konkursoj 1986. Prezo: 2,70 gld.

Esperanto tarptautiné kalba, Laurynas Skŭpas. Vilnius: Mokslas. 1987. 112p. 17cm. Superrigardo pri la lingvo kaj movado. Prezo: 3,90 gld.

F.E.L.-kadrokursoj 1981-82, div. aŭtoroj. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1982. 32p. 21cm. Mimeo. Broŝ. Konsilaro por movadaj aktivuloj. Prezo: 2,70 gld.

F.E.L.-kadrokursoj 1982-83, div. aŭtoroj. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1983. 51p. 21cm. Mimeo. Broŝ. Konsilaro por movadaj aktivuloj. Prezo: 5,10 gld.

Forgesitaj homoj (1936), Cicio Mar. Chongping: LDE, 1985. 215p. 19cm. Reeldono de historie grava kolekto de originalaj rakontoj pri ĉinaj malriĉuloj. Prezo: 9,00 gld.

Kolektitaj poemoj, L.N.M. Newell. Red. Edwin de Kock, kun antaŭparolo kaj ampleksa biografia posteseo. Manĉestro: Esperantaj Kajeroj, 1987. 80p. 21cm. ISBN 0 9505323 6 3. Definitiva verkaro de talenta, ofte preteratentata poeto. Prezo: 12,90 gld.

Saluton! Esperanto aŭtodidakte, Audrey Childs-Mee. Roterdamo: UEA, 1987. 194 + 40p. 21cm. Ilus. ISBN 92 9017 036 0. Kvara eldono de la fama lernolibro. Prezo: 24,00 gld.

Sciencaj komunikaĵoj 1986, red. András Lukács. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1986. 88p. 23cm. Ilus. ISSN 0133-1027. Prezo: 9,00 gld.

Socipolitika, pedagogia kaj kultura valoroj de Esperanto, La, Edward Symoens. Roterdamo: UEA, 1986. 40p. 21cm. Broŝ. Esperanto-Dokumentoj 23E. ISSN 0165-2524. Prezo: 3,00 gld.

Sonĝo de Ĝenĝen, Mei Jing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1986. 48p. 16×18cm. Ilus. Infanrakonto pri aventuroj de trodorlotita knabineto, kun grandaj koloraj bildoj. Prezo: 3,00 gld.

Ŝanĝopunkto, La, Jeremi Gishron. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1987. 38p. 14cm. Mimeo. Broŝ. Pensoj pri la koncepto de inoninterŝanĝo. Prezo: 9,90 gld.

Urboranda nokto, Attila József (1905-1937). Div. tradukintoj; red. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio. 1986. 141p. 20cm. ISBN 963 571 169 7. Serio "Hungara Literaturo" n-ro 1. Elektitaj poemoj de la plej granda ĉi-jarcenta hungara poeto. Prezo: 13,80 gld.

Verda trobadoro: internacia kantaro, red. W. van den Blink kaj B. de Wit. Heemstede: Bond van Arbeiders-Esperantisten FLE. 200p. 21cm. ISBN 90 70843 03 X. Tradiciaj kaj modernaj kantoj, i.a. pluraj porpacaj, feministaj kaj socikritikaj, kun muziknotoj kaj amuzaj ilustraĵoj. Prezo: 18,60 gld.

Vivo de Bertha von Suttner, Walter Klag. Vieno: la aŭtoro, 1986. 3p. 30cm. Biografieto de fama aŭstria pacaktivulo. Prezo: 1,50 gld.

Vocabulario Esperanto-Espagnol (1959), E. Tudela Flores. Zaragoza: Hispana Esperanto-Federacio, 1987. 176p. 21cm. Represo de unudirekta vortaro. Prezo: 14,70 gld.

Vvodnoe slovo v iskusstvo perevoda, N.F. Danovskij. Riga: la aŭtoro, 1985. 132p. 21cm. "Enkonduka vorto pri la arto traduki" inter la rusa kaj Esperanto. Prezo: 6,00 gld.

Zamenhof et l'espéranto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broŝ. Prezo: 4,20 gld.

Zamenhof und Esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broŝ. Prezo: 4,20 gld.

Zamenhof y el esperanto, Norman Berdichevsky. Jerusalemo: Eldonejo Sivron, 1986. 10p. 15cm. Broŝ. Prezo: 4,20 gld.

Diversaĵoj

Fajrigilo: "Mi (koro) Esperanto-n 1887-1987". Wilrijk (Belgio): Eldonejo Sonorilo, 1987. Prezo: 3,00 gld.

Filatelaĵo: Surinamo: Poŝtmarkserio 1987. Kompleto de tri poŝtmarkoj honore al la Jubilea Jaro de Esperanto. Prezo: 7,80 gld.

Filatelaĵo: Surinamo: Poŝtmarkserio 1987, en plasta ujo. Prezo: 9,90 gld.

Filatelaĵo: Surinamo: Unuataga koverto, 1987. Prezo:10,50 gld.

Globkrajono: "Mi (koro) Esperanto-n 1887-1987". Wilrijk (Belgio): Eldonejo Sonorilo, 1986. Havebla en la koloroj blua, flava, ruĝa, blanka, verda, kaj nigra (kun blua inko). Prezo: 3,00 gld.

Gluafiŝo: "Internacia lingvo Esperanto". Wilrijk (Belgio): Eldonejo Sonorilo, 1986. 17×7cm. Nigra-blanka-verda, kun homa figuro tenanta verdan stelon. Prezo: 1,80 gld.

Glustrio: "Mi (koro) Esperanto-n 1887-1987". Wilrijk (Belgio): Eldonejo Sonorilo, 1986. 6×34cm. Verdaj literoj kaj ruĝa koro sur travidebla plasto. Prezo: 3,00 gld.

Gluetikedaro: "Esperanto 1887-1987". Wilrijk (Belgio): Eldonejo Sonorilo, 1987. 13×50mm. Oraj literoj sur blanka fono. Po cent etikedoj. Prezo: 6,60 gld.

Kasedo: Katalogo por Spectrum 48K. Programaro por ZX Spectrum, kreita por Esperanto-uzantoj kaj ebliganta ajn-strukturan kaj ajn-enhavan registradon de informoj. Prezo: 24,00 gld.

Kasedo: Tute ne gravas, Amplifiki. Milano: Bendofako de LF-koop, 1986. 45-minuta kasedo de la populara junulara grupo. Prezo: 27,90 gld.

Ŝlosilkolektilo: "Esperanto 1887-1987". Wilrijk (Belgio): Eldonejo Sonorilo, 1986. Havebla en la koloraj blua, flava, ruĝa, blanka kaj verda. Prezo: 3,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezaj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 20% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!

Oficiala informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
S-ino A. Mussabini, Francio; R. Manau Torres, Hispanio; S-ino K. Sicherman, Israelo.

PATRONOJ DE TEJO 1987:
Belgio: Antoine J. Mechelynck; Stella De Weerd. Bermudo: R. Smales. Britio: Jack Heath; J.M. Ibbotson; Charles Alan Shrives; Patricia C. Sinclair; Yasusi Hayasi. FR Germanio: Elisabeth Schwarzer; Franz Knöferl; Günther Becker; Didier Izacard; Maria Vitalyos. Francio: Gerard Peet. Hispanio: Ada Fighiera-Sikorska. Honkongo: Ian Jackson. Israelo: David Mager; Jehoŝua Tilleman; Josef Murĵan; Josifa Rabino. Italio: Carla de Lorenzi; Clara Gubbioli Carioli; Michela Lipari Sato; Sergio Martina. Japanio: Humiya Morita; Ikuko Yazima-Kitagawa; Yosiaki Isii; Bun'iti Isizaki; Yukio Izumi; Zyun-iti Sibayama; Sirô Koga; Jasuo Mori; Kôiti Simizu; Ŝooiĉi Satoo; Yosiki Tatumi. Kanado: Paul S. Hopkins. Kanarioj: María Pi Maynar. Luksemburgio: Brian R. Moon. Nederlando: F.J. Pieterson-Kruger; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; J. Soeteman; Louise Adelaar; Willem P. Roelofs; R. Vetter. Nov-Zelando: Larry W. Skiba; Frank E. Swift. Usono: Ellen Eddy; Miguel-Angel Altuna Aspiazu. Forpasinta: Peter Zlatnar.

DONACOJ 1987 (gld)
ĝis 30-a de aprilo

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Aŭstralio: K.McCashney 50,00; G. Tumman 60,00. Britio: B. Phillips 32,75. Finnlando: I.E. Heikkilä 161,07; T. Österman 178,42; J. Laaksonen 106,72. Islando: K. Eiriksson 253,40. Italio: P.B. Marson 300,00. Japanio: J. Isano 100,45; A. Huĝihira 100,45; H. Kitabatake 100,45; M. Sakaŝita 26,45; Y. Umeda 100,00; S. Umeda 100,00. Nederlando: R. Moerbeek 250,00; M.Hoonakker 150,00. Nov-Zelando: Ryan 33,08. Svedio: B. Karlsson 50,00. Usono: S.M. Klimowicz 100,00; J. Philips 131,45. Venezuelo: A. Solarz 25,00. Sumo ĉi-jara 7093,87.

FONDAĴO CANUTO: Aŭstralio: V. Fotheringham 92,05. Finnlando: V. Tietti 19,39; H. Tietti 11,54. Honkongo: I. Jackson 100,45. Diversaj malgrandaj 9,23. Sumo ĉi-jara 2805,61.

ĈINIO: Japanio: Naosuke Nobuki 70,00. Sumo ĉi-jara 836,00.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj); Venezuelo: A. Solarz 10,00. Sumo ĉi-jara 250,53.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: K. McCashney 50,00; T.M. Metherall 144,75; G. Tumman 90,00. Britio: Griffiths 15,63; E.J. Snowden 16,37; A.H. Gardner 16,38. FR Germanio: Pahnhenrich 21,44. Norvegio: J. Rommesmo 160,70. Svedio: R. Emson 242,20; B. Karlsson 50,00. Usono: D. Holland-Kaupp 100,45; J. Edwards 210,70; H. Tonkin 210,70. Venezuelo: A. Solarz 25,00. Anonime 60,00. Kunveno de SAT-Rotterdam 60,00. Diversaj malgrandaj 28,51. Sumo ĉi-jara 5708,90.

JUBILEA JARO: Aŭstralio: T.M. Metherall 200,00. Japanio: Y. Umeda 60,00; S. Umeda 100,00. Norvegio: J. Rommesmo 50,00. Nederlando: Esp.Klubo Dreves Uitterdijk 50,00. Sumo ĉi-jara 4878,87.

FONDAĴO SCIENCO KAJ TEKNIKO: Japanio: H. Kodama 100,45. Sumo ĉi-jara 1723,80.

FONDAĴO TEJO: Aŭstralio: R. Tumman 105,00. Japanio: Y. Umeda 50,70; S. Umeda 10,70. Usono: S.M. Klimowicz 48,75; J. Renshaw 48,75; D. Renshaw 48,75. Sumo ĉi-jara 2102,79.

FONDAĴO WÜSTER: Anonime: 1127,40. Nederlando: Subvencio BSO 2500,00. Sumo ĉi-jara 5008,63.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Aŭstralio: G. Tumman 60,00; R. Tumman 105,00. Finnlando: L.Bergman 236,95. Francio: Villegier 70,46. Japanio: E. Baba 100,45; E. Yamato 100,45. Novzelando: S.H. Dodds 44,10. Venezuelo: A. Solarz 25,00. Sumo ĉi-jara 3255,56.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA
KLUBO 777 ($777): Usono: H. Tonkin. PATRONOJ (minimume $100): Venezuelo: Larga Adomski (por 1986). Finnlando: Helvi Jaakkola. FR Germanio: Heinrich Nischwitz; Werner Heinrich. Hispanio: Kristina Goralski. Japanio: Nobuo Sakurai. Usono: Bruce A. Sherwood; Dorothy Holland-Kaupp; Thomas H. Goodman. SUBTENANTOJ (minimume $25): Aŭstralio: Teresa M. Metherall. Belgio: Stella De Weerd. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Finnlando: Hemmo Tietti; Terttu Österman; Veera Tietti. FR Germanio: Hans Georg Strauss. Japanio: Tadao Yosida. Nov-Zelando: S.H. Dodds. Usono: Cleo J. Fort; Donna R. Stitz; Horace Bryce Hand; Jack Wright; Sonoko Kuzume; Scott S. Smith; William R. Harmon. AMIKOJ (minimume $10): Aŭstralio: T. Elliott. Belgio: L. Drèze. Finnlando: Aappo Kurikka; Lauri Mustonen. FR Germanio: Esperanto-Grupo Nürnberg; Richard Wluka. Israelo: Andreo Ŝalamon; Cvi Löwenkopf; Julius Hecht. Italio: Gruppo Esperantista Trentino; Renata Bonvicini. Japanio: Sirô Koga; Syozi Hosonuma. Nederlando: Robert Moerbeek. Norvegio: Elna Matland; Ragnar Winsnes. Svedio: Amy Nilsson; Dora Viola Andersson; Gunilla Sundholm; Henrik Karlsson. Usono: Frederik J. Belinfante; Albert E. Estling; Walter W. (Folio) Kim; James F. Cool; June Knudsen-Fritz; Pearl Wegher; Ronald J. Glossop; Douglas B. Swett; Vincent A. Griffeth; Werner Simon.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Loke

● **Turkio:** Esperantistoj vojaĝantaj en Turkio povas utiligi la servojn de kvar esperantistaj organizaĵoj por turismaj celoj. Inter la ofertoj troviĝas "tutjara praktikejo" en Kumburgaz apud la Marmora Maro, kaj esperantistaj laborbrigadoj en aŭgusto-septembro. Ankaŭ koresponda servo ekzistas por turkaj junuloj ĉe la sama adreso: Esperamonde, Laleli, Genctürk cad., Mahfil sok no. 20 kat 4, Istanbulo, Turkio.

● **Venezuelo:** Venezuela Esperanto-Asocio informas, ke ne povos okazi la Festivalo pri Turismo, Komunikado kaj Kulturo planita por oktobro 1987 en Karakaso, dank' al manko de ŝtata subteno. Cetere, tamen, la agado de la Asocio bone progresis, aparte en kelkaj gravaj amaskomunikiloj: i.a. ĵurnaloj en Marakajo, Karakaso kaj Barkisimeto kaj du naciaj televidstacioj.

● **Kanado:** Ampleksan informkampanjon en Montrealo entreprenis Esperanto-Societo Kebekia, kies centran parton formas 830 reklamafiŝoj lokitaj en la urbaj aŭtobusoj (kontraŭ kosto de ĉ. 3000 guldenoj). Komencis veni intervjupetoj de pluraj urbaj, provincaj kaj naciaj amaskomunikiloj.

● **Madagaskaro:** La nacia kunordiga komitato pri la Jubilea Jaro organizis solenaĵon en la madagaskara ĉefurbo Antananarivo, la 4an de februaro. Aŭspiciis ĝin la prezidanto de la Nacia Popola Asembleo, s-ro Andrianaharinjaka kaj la prezidanto de la nacia Kultura kaj Socia Komisiono, s-ro Rakotoniaina.

● **Nepalo:** La nepala traduko de *Kumeŭaŭa, filo de la ĝangalo,* aperos en almenaŭ du nepalaj ĵurnaloj en la Jubilea Jaro, raportas la tradukinto, Gamvir Man Ŝresta. Li ankaŭ sendis al ni eltondaĵon el la ĵurnalo *Ĵanamvumi,* kie oni kritikas la nepalan Unesko-komisionon ĉar ĝi ne havas planon iel festi la centjariĝon de Esperanto.

● **Kolombio:** Kvankam la membrostatistiko en Kolombio falas pro la tre malforta stato de la nacia valuto, surloke la Movado tute inde kreskas kaj aktivas dum la Jubilea Jaro. Krom diversaj gazetartikoloj kaj informiloj, elstaras la ĵuseldonita lernolibro *Unu mondo, unu lingvo* de prof. Luis Jorge Santos-Morales. Pliaj informoj aperas en la regiona periodaĵo *Andaj ondoj* (abonoj ĉe A.A. 54800, Bogotá 2, Kolombio).

● **Benino:** La benina esperantisto Tchipke Privas, kiu jam de kvar jaroj estas aktiva, fariĝis la prezidanto de la nove refondita Benina Esperanto-Asocio, kies ekzisto grave ligiĝas al la nuna prospero de la klubo "La Verda Stelo" en Cotonou. La fotoj montras kune ekskursantajn anojn de tiu klubo, kiu estas la ĉefa apogo por la ceteraj esperantistoj en Benino. Ĝi serĉas (fidelajn) ĝemelajn klubojn en aliaj landoj: skribu al B.P. 06-1855, Cotonou, Benino.

● **Ĉeĥoslovakio:** La junulara revuo *Pionýr* en Prago publikigis tripaĝan redakcian artikolon pri Esperanto en la 7a numero de 1987. La teksto, akompanata de koloraj bildoj, temis pri la Jubileo kaj pri la Klubo de Internacia Amikeco, gvidata de J. Říha, en Netolice.

● **Dominikana Respubliko:** Post profesia restado en Haitio kaj stimulado tie de loka Esperanto-movado (la membrostatistiko tie kreskis de 2 ĝis 16 en la Jubilea Jaro!), Eugene Mustea pluiris al Dominikana Respubliko kaj instruis enkondukan kurson al kelkaj interesatoj, survoje hejmen al Svedio. S-roj Robert Suero kaj Ante Ferenčić pluzorgos pri evoluo de loka movado.

● **Finnlando:** Enkadre de la Vintraj Kulturtagoj de la urbo Jyväskylä, Universala Artista Ligo de Esperantistoj aranĝis internacian artekspozicion. La ekspozicio vekis grandan intereson, kaj diplomojn ricevis partoprenantoj el Bulgario, Ĉinio, Finnlando, Francio kaj Hungario.

● **Sudafriko:** Ĉirkaŭ kvindek personoj ĉeestis la unuan nacian kongreson de Sudafrika Esperanto-Asocio, de la 3a ĝis la 7a de aprilo en la "Amika Urbo" Portelizabeto. Laŭ decido tie farita, landa kongreso okazos ekde nun ĉiun duan jaron, kaj la venonta en 1989 situos en Svazilando por stimuli partoprenon de afrikanoj el aliaj landoj. La kongresaj prelegoj aperos en la junia numero de la landa revuo *Bona espero,* sub redakto de Cobus Zeelie, prezidanto de la organizanta klubo; ĝi haveblas de Oskaro Sher, Bronkhorststr. 75, Groenkloof, Pretorio, 0181 Sudafriko. Mendu frue!

● **Togolando:** Je la 21a de marto 1987 fondiĝis la "Unuiĝo Togolando por Esperanto", post longaj kaj zorgaj preparoj ĉefe fare de Koffi Gbeglo kaj Mensah Agbemadon, la du pioniroj en Togolando. En la nova asocio grupiĝas la du apartaj kluboj de Lomé, Nova Sento kaj TEA, plus tri grupoj en aliaj urboj. La statuto kaj regularo de UTE, kiuj dediĉas apartan atenton al Esperanto-instruado en Togolando, estas prezentotaj al la ŝtataj instancoj por aprobo. Por gratuli, pluinformiĝi aŭ proponi helpon skribu al UTE, B.P. 13369, Lomé.



● **Francio:** En Parizo aperis medaliono honore al la Jubileo, fare de la oficiala monfabrikejo "Monnaie de Paris" kaj desegnita de Serge Santucci (bildo). UEA verŝajne aĉetos stokon de la bronza eldono kaj vendos ĝin tra sia Libroservo.

Pake

● **Ŝako:** La 2a Ŝakolimpiko de Esperantistoj okazos en Siedlce, Pollando, de la 15a ĝis 25a de julio (t.e. tuj antaŭ la UK). Partoprenos landaj teamoj de po kvar ludistoj (por viroj) aŭ po du (por virinoj). Antaŭ kvar jaroj 12 viraj kaj 8 virinaj teamoj inaŭguris la Olimpikojn en Kalocsa, Hungario.

● **Floroj:** En Nederlando (kompreneble!) aperis nova tulipo kun la nomo "Tulipa viridiflora Esperanto". Ĝin kreis s-ro J. Pranger, kiu jam en 1960 havigis la unuajn bulbojn sed bezonis 25 jarojn por multobligi ilin ĝis komerca kvanto (t.e. tutaj kampoj da!). La petaloj estas verdaj kun ruĝa rando; la folioj estas verdaj kun blanka rando.

● **Bahaanoj:** Plurnacia grupo de bahaaj esperantistoj renkontiĝis en Delhio fine de decembro 1986, kadre de inaŭguro de la unua bahaa Adorejo en Hindio. Vicprezidanto de Bahaa Esperanto-Ligo s-ro Pierre Parini poste vojaĝis al Lucknow, kie li renkontiĝis kun lokaj esperantistoj kaj instigis al restarigo de Esperanto-kurso en la loka bahaa centro.

● **Fervojistoj:** Pli ol cent homoj partoprenis la jubilejaran kunvenon de JAFE (Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj), kiu okazis la 18an de aprilo en Vrnjačke Banja. Al la abunda programo aldoniĝis frumatena tertremo kies forto estis 4,5 gradoj. Lokaj societoj en Sarajevo, Kraljovo, Vranje kaj Zagreb estis elstarigitaj pro la pasintjara agado.

● **Samseksamantoj:** Ĉi-jare la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj festas sian dekjaran datrevenon, kreskinte de grupo de kvin iniciatintoj al asocio kun ĉ. 200 membroj en 29 landoj. Kvinfoje jare aperas ĝia bulteno *Forumo*. Okazos jarkunveno dum la UK kaj semajnfina renkontiĝo en Morecambe, Britio, fine de junio (informoj ĉe Peter Danning, G/F, 68 Church Rd, Richmond, Surrey, Britio TW10 6LN).

tutmonda esperantista junulara organizo

tejo—TUTMONDE

oficiala gazeto de tejo dumonata

● **TEJO:** Laŭ decido post la neŭrima IJK, la oficiala organo de TEJO nun estas *TEJO—tutmonde* (anstataŭ TEJO-paĝo en *Esperanto*). En Krakovo oni diskutos pri eblecoj aboni ĝin. Por informiĝi aŭ kontribui, skribu al la redaktoro, Andy E. Künzli, Zumhofstr. 22, CH-6010 Kriens, Svislando.

● **Motorsporto:** La motorsporta komisiono de la aŭstra sportligo ARBÖ organizas konkurson pri la Skolta Trofeo 1987 por amatoraj motorciklistoj. Unu el la konkursaj branĉoj postulas viziti motorcikle kiel eble plej multajn eŭropajn urbojn, kie okazis Universala Kongreso de Esperanto. Pliaj informoj ĉe ARBÖ, p/a Max Hollinger, Gruberstr. 65, A-4020 Linz, Aŭstrio.

● **Kristanismo:** Ĵus aperis la unua numero de *Evangeliaj Kajeroj,* internacia revuo pli ol 80-paĝa kiu entenas artikolojn el diversaj (kaj plurlandaj) vidpunktoj ĉirkaŭ unu temo. La temo de la inaŭgura numero estas "La Biblio"; laŭplane sekvos "Ekologio" en oktobro ĉi-jare. Abonoj 60FRF aŭ egalvaloro (por du numeroj), al konto phco-m pere de UEA aŭ ĉe Philippe Cousson, La Hameau des Plaids, Nouaillé-Maupertuis, F-86340 La Villedieu de Clain, Francio.

● **Unesko:** La parolado de la ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro M'Bow, pro ricevo de la Premio Zamenhof (vd. *Esperanto* 1987/p.5-6), estas presita kaj dissendita de Unesko al ĉiuj membraj registaroj, ĉiuj ligitaj neregistaraj organizaĵoj k.a. (temas pri dokumento DG/86/52). Tio aldoniĝas al persona letero de s-ro M'Bow pasintan oktobron, kiu memorigis la naciajn komisionojn pri la sofia rezolucio pri Esperanto.

● **Vid-handikapuloj:** En januaro aperis la unua grandlitera numero de *La kontakto,* organo de la Nederlanda Societo de Blindaj kaj Malfortevidantaj Esperantistoj (NoSoBE). Jam 40 jarojn la revuo aperis en brajla preso, kiu daŭros apud la grandlitera eldono. Abonoj (12,50 gld. en Nederlando) haveblas ĉe J. Wieringa, Julianalaan 8, NL-9801 BD Zuidhorn.

● Vidhandikapitoj, kiuj estas individuaj membroj de UEA, kaj kiuj en la Jubilea Jaro ŝatus profiti posedon de parto de la Jarlibro, nome la Gvidlibro sur 3 kasetoj, povas sin anonci brajle, vidulskribe aŭ telefone ĉe la administrantino de LIBE (vd. pĝ.2 de EL) aŭ ĉe la Centra Oficejo de UEA. Tiu servo estos senpaga, sed eblos nur post surbendigo de la 3 kasetoj.

Ĉu vi volas gajni monon?

Kompreneble, kiu ne volas? Kaj vi povas fari tion, se vi varbos anoncon por la Jarlibro de ekstermovada instanco.

Pro sukcesa varbo, vi ricevas maklerajon de 30% de la prezo de la anonco.

Petu detalojn kaj tarifojn de la Centra Oficejo.

Anoncetoj

Al granda manifestacio de eŭropaj civitanoj en Bruselo, de la 28a ĝis la 30a de junio, invitas la belgaj esperantistoj. Pri programo, vojaĝ- kaj loĝeblecoj ktp, informiĝu ĉe Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio.

Por vendo: La jugoslava paro de Esperanto-poŝtmarkoj emisiita en 1953 vendiĝas. La kataloga prezo estas 4 100 danaj kronoj. Ofertojn je pli ol 3 000 d.kr. akceptos Eldonejo Perspektivo, Norregardsvej 91, DK-2610 Rodovre, Danio.

Redaktoro de la ĉina revuo *Veterana Esperantisto* Wu Chang Shen tre deziras kontaktojn kun esperantistoj el diversaj landoj. Profesie elektronika inĝeniero, li krome interesiĝas pri filatelo kaj historiaj materialoj pri la Movado. 1 Jiefang Donglu, Changsha, Hunan, Ĉinio.

Irana komencanto, 17-jara studento pri tekniko, deziras korespondi: Yosef Mosayebi, Nu.21 K. Ameinei, 3 Ramzanpor, Ghaem Mahalleh, Ghaem Shahr, 47619 Mazandaran, Irano.



La foto montras anojn de memlerna grupo de la Ĉengdua Esperanto-Ligo, kiuj renkontiĝis dufoje ĉiusemajne de post septembro 1984 por lerni Esperanton. Skribu al: Dian Ewen, Changdu, Dianqichang, Ĉinio.

Materialojn por ekspozicio en la Jerusalema Universitato, dum julio-aŭgusto 1987, petas (prunteprene!) Inĝ. Moŝe Savir, 35 Alfasi str., 92302 Jerusalemo, Israelo. La universitato disponigas ankaŭ originalajn manuskriptojn de d-ro Zamenhof.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn s-ro Mehmet Telyakar, Aydinlik Sokak 23, Ortaköy-Istanbul, Turkio.

Malnovaj *Kontaktoj*: mi deziras aĉeti ĉiujn antaŭ 1969:2. Leif Nordenstorm, Lilla Nygatan 3 B, S-961 32 Boden, Svedio.

Profesia libro- kaj gazeto-bindisto proponas siajn servojn al la Esperanto-merkato. Skribu al Stanislav Bartovic, Vážska 3560, 921 01 Piešťány, Ĉeĥoslovakio.

Deziras korespondi kun Esperanto-amikoj en diversaj landoj s-ino Brigitte Binder, Mase-Herm-str. 23, Brandenburg, DDR-1800, Germana DR.

34-jara ĉina instruisto deziras korespondi kun esperantistino, serĉas amikecon aŭ edziĝon. Ŝatas sporton kaj muzikon, petas leteron kaj foton. Zang Yuhuai, Profession High Middle School, Dehui, Jilin, Ĉinio.

Deziras korespondi kun junuloj de la tuta mondo, interŝanĝante poŝtmarkojn kaj bildkartojn, 13-jara Ĝehan Zebĥan, c/o Habib-ur-Rehman Ĥan, B.A.LL.B., Modrissa Mohalla, Ghelum, Pakistano.

Nova Esperanto-klubo petas novajn aŭ uzitajn librojn kaj revuojn, pretas kompensi per kolombiaj memoraĵoj: Gabo-Klubo, p/a Guillermo Taborda Restrepo, A.A. 38-37, Medellin, Kolombio.

L'alf-beta kanto senpage al ĉiu petanto plus agrabla jubilejara surprizo! Esperanto-Klubo Sivron, 41 Jeĥezkel-str., IL-95 351 Jerusalem, Israelo.

Reciprokos sendon de senpagaj Esperantaj libroj per la ĉina unuataga koverto pri la Jubileo. S-ro Wang Chang Qing, Jiangkou Erjie Juwejhui, Zhijiang Xian, Hubei, Ĉinio.

Ekzempleroj de kaj la franca kaj la flandra volumoj de *Belga antologio* (1928) denove haveblas ĉe la Libroservo de UEA (prezo: po 39,00 gld.).

46-jara inĝeniero korespondus tutmonde pri diversaj temoj: Ivan Petrov, bul. Mogilev 35, an. 10, BG-5300 Gabrovo, Bulgario.

96 paĝoj de amuzo, vario kaj instruo en la kvar numeroj de la lernejana revuo *Juna Amiko.* Jarabono 8,40 gld. ĉe UEA (por 8 aŭ pli ĉe unu adreso, po 7 gld; por 30 aŭ pli, po 6 gld.) Sendu ekzempleron petu ĉe Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapest.

"Survoje al pontokulturo": Materialoj pri la kosmopolita humanismo (homaranismo). Enhavo: *Homaranismo hodiaŭ, Marburga Manifesto, Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj* (Unuiĝintaj Nacioj), *Deklaracio pri Homaranismo* (Zamenhof), *Preĝo sub la verda standardo* (Zamenhof). Jen la minimumo, kiun ĉiu esperantisto devus scii pri la hodiaŭa homaranismo! Vi ricevos la verkon kontraŭ 4 int. respondkuponoj, de: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

E S P E R A N T I X

ELDONISTO & DISVENDISTO

ĝojas anonci al vi la aperon en la jubilea jaro 1987 de tri novaj bildstriaj albumoj. Tio ebliĝis pro la transformo de ESPERANTIX en entreprenon kun respondeco limigita al la kapitalo de 50 000 FRF (franca s.a.r.l.), la 1987-04-14an (datreveno de la morto de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Lazaro ZAMENHOF).



A S T E R I X, L A G R A N D A F O S A Ĵ O

Teksto kaj desegnoj de UDERZO. Traduko de Jopetro DANVY kun kunhelpo de Georgo LAGRANGE (ambaŭ estas membroj de la Franca Esperanto-Instituto). Bindita, 46 paĝoj. Aperos en junio 87, prezo por antaŭmendoj 50 FRF (post la unua de junio: 57,50 FRF). ISBN 2-86497-

Temas pri nova aventuro de Asterix en kiu li, Obelix, Miraklomix kaj la hundeto Idefix devas helpi la maldekstran duonon de vilaĝeto (kiu estas disigita de larĝa fosaĵo) pro tio, ke la dekstra duono petis la helpon de la romianoj....

T I N Ĉ J O, L A N I G R A I N S U L O



Teksto kaj desegnoj de HERGÉ. Traduko de Jopetro DANVY kun kunhelpo de Georgo LAGRANGE. Bindita, 62 paĝoj.Kostos 40 FRF (46 FRF post apero en septembro). ISBN 2-203-01002-

Temas pri nova aventuro de Tinĉjo kaj Miluo, kiuj malhelpataj de Citserono kaj Tsicerono (respektive ronda kaj rekta liphararoj) frontas monfalsistojn.

T I N Ĉ J O, LA KRABO KUN ORAJ PINĈILOJ

Tekstoj kaj desegnoj de HERGÉ. Aperis en decembro 1981 kaj gajnis la unuan premion BILDLIBRO DE LA JARO 1982. 62 paĝoj. Kostas ĝis la unua de junio 37,50 FRF (poste 46 FRF). Atentu, ke ĝi BALDAŬ ELĈERPIĜOS. ISBN 2 203 01001 0

BLAKE & MORTIMER, LA MISTERO DE LA GRANDA PIRAMIDO

Tekstoj kaj desegnoj de Edgar P.JACOBS, Traduko de Joperto DANVY kun kunhelpo de Georgo LAGRANGE. Broŝurita, 62 paĝoj. Kostas 60 FRF (69 FRF post la unua de decembro). ISBN 2-87097-

Temas pri novaj herooj en Esperantujo, kiuj baraktas kontraŭ la kolonelo Orlik en la granda piramido de Keopso. Ĝi estas tiel historie detale, ke ĝi inspiris la nuntempajn arkeologiajn priserĉadojn. La tekstoj estas tiel densaj kaj beletraj, ke estas kvazaŭ literatura verko ilustrita.

Rabatoj & sendokostoj: Mendoj de 10 aŭ pli da ekz. de la supraj (eĉ miksitaj) ricevas 10% da rabato. Ekde 25 ekz. la rabato estos 15%. Por 100 aŭ pli da ekz. la rabato estos 20%. Se vi deziras mendi samtempe 400 aŭ pli da ekz. konsultu nin. La rabatoj estas por unu sama mendo kaj sumeblaj por la sama titolo aĉetita ĉe ni. Vi povas ekz. mendi 20 ekz. de Asterix kaj 5 ekz. de Tinĉjo kaj ricevi minimume 15% sur la totalo. Se vi antaŭe aĉetis ĉe ni 90 ekz. de Tinĉjo, tiam vi ricevas 15% por Asterix sed 20% por Tinĉjo. Vi kompreneble devas antaŭmendi maksimume por havi grandan profiton. ALDONU 15% (minimume 12 FRF) POR SENDOKOSTOJ.

Antaŭmendoj: La prezo por antaŭmendoj validas ĝis la fino de la monato antaŭ tiu de la apero kaj estas tre favora. Poste ĝi estos 15% pli kosta (ni indikis inter parentezoj la finan prezon). Por antaŭmendoj de 25 aŭ pli vi nepre devas pagi minimume duonon antaŭ la limdato.

Mendu tuj, tiamaniere vi helpas nin presigi ilin kaj vi profitas de la favora prezo por antaŭmendoj! Dank'al VI Asterix, Tinĉjo, Blake & Mortimer ne forgesos aŭ eĉ lernos Esperanton!

N.B. Pro komercaj kialoj la nomo de la heroo (kiu estas registrita komercmarko pro la komercaj derivaĵoj) kaj tiuj de liaj amikoj estas skribitaj per ikso ("X") sed la tekstoj estas memkompreneble en fundamenta Eo. Historie tiun literon adoptis romianoj el la greka kiel mallongigon de sia "CS" (prononcita "ks") de kie venas la nomo en Eo. La simbolo "&" estas mezepoka mallongigo por la latina ekvivalento de "kaj", kaj fakte estas "E+t" manskribitaj en unu fojo. ISBN signifas Internacian Sisteman Bibliografian Numeron kaj identigas titolon el eldonzono aŭ lingva grupo, kaj specifan eldoniston ene de tiu zono aŭ grupo.

Ludoviko LAZARO eldonisto & disvendisto

ESPERANTIX SARL, P.O. Kesto 40, 11 rue Frédéric Magisson, 75015 PARIS Cédex 15, FR Francio
Telefono : Int. 33 (1) 4558 4112 ● Poŝtĉekkonto: 2 007.47 J Paris ● Telegramadreso: ESPERANTO-PARIS

ĈU VI IROS AL VARSOVI'?

Tiam aĉetu la flugbileton de via flughaveno al Varsovio kaj reen ĉe ni. Pro speciala kontrakto kun la Pola flugkompanio LOT ni povas oferti al vi vere malmultkostajn flugbiletojn. Ekzemple por Frankfurto-Varsovio-Frankfurto vi pagos nur 571 DM, t.e. 50% de la normala flugprezo. — Kaj aĉetante la bileton ĉe ni vi samtempe subtenas la Esperanto-laboron, kvankam vi ne pagos pli.

Skribu aŭ telefonu laŭeble baldaŭ al Esperanto-Centro, poŝtf. 1450, D-4790 Paderborn, tel. 05251-27612, tage + nokte.

Someraj Universitataj Kursoj

organizas Sesion de la 6a ĝis la 18a de julio 1987 en la belega kadro de la Universitato de Lieĝo en Sart-Tilman. 4 temoj antaŭvidataj: lingvistiko, sociologio, stereografio kaj ekologio.

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas 12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj. Eblas partopreni plurajn sekciojn. Loĝado kaj manĝado surloke en la Universitato. Vizitoj kaj kromprogramoj antaŭvidataj. Aliĝu rapide kaj petu informojn al:

José Jacob, Sekretario de S.U.K.,
B.P. 62, Liège X, BELGIO.



"Mohamed Didi estas fremdulo en sia lando. Li preskaŭ nenion scias pri Maldivoj kaj ĝia popolo — en la lernejo oni havas anglajn studplanon kaj lernolibrojn. Li detale studas la historion kaj la geografion de la britaj insuloj, sed li scias la nomon nur de malgranda nombro de la maldivaj atoloj." (Laŭ libro de Tord Wallström)

Jen eltiraĵo pri kultura dependeco el ordinara privojaĝa romano. Ĉu vi konas plurajn tekstojn pri tiu temo? Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo bezonas ilin por informa kampanjo pri kultura dependeco.

Skribu al: **Leif Nordenstorm,**
Lilla Nygatan 3 B, S-961 32
Boden, SVEDIO.

SEJU

Fokuso

Kvaronjara popularscienca magazino

64 paĝoj, 22 × 15,5 cm
Jarabono ĉe UEA 24 gld.

SENPAGA PROVEKZEMPLERO:
HEA-FOKUSO, Pf. 193, H-1368
Budapest, Hungario



pli serioza kaj pli riĉa meditado pri la vivo

Esplorado de Vivĝojo

Hidemaru Deguĉi

en la majstra traduko de E. Itoo kun antaŭparolo de Tadao Umesao kaj la vinjetoj de Naohi Deguĉi en luksa kaj freŝa grafika aranĝo.

"La sereno kiun mi trovis en la paĝoj, sendude reflektas la animon de la aŭtoro samkiel tion de la tradukinto kiu tiel fidele ĝin spegulas. Aparte interesis min la ĉapitro 'La Idealo de Eduko'. La ideo kuraĝigu kaj gvidu anstataŭ trudu kaj kritiku, ŝajnas al mi tute vera vojo al eduko — se mi ĝuste komprenis la esencon de tiu ĉapitro." (Cathy Schulze, ELNA)

Redaktis: Internacia Fako de Oomoto. Eldonis: Tensei-ŝa, Kameoka. 1986. 203p., ilustr., bindita. prezo: 32,70 Gld. aŭ 2000 enoj + sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la redaktinto.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL